

**JURA
TRIBUNO
INTERNACIA**



N-ro 25

Jaro 2026:1

Internacia Jurista Esperanto-Asocio

ISSN: 3101-2965



Eldonita de Internacia Jurista Esperanto-Asocio
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Poŝta adreso: Jura Tribuno Internacia
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

ret-adreso: jurista@esperanto.ac

Direktoro: José M. Rodríguez
Kunlaborantoj: M^a Rafaela Urueña Álvarez (Hispanio)
Miguel Faria de Bastos (Portugaliao)
Alejandro Burgos Escalante (Hispanio)
Swietosław Fortuna (Pollando)
Nelson di Blanco (Argentino)

ENHAVO

Ĉu tradukoj povas perfidi la justicon? La Artefarita Intelektio kaj la lingva breĉo en la internaciaj kortumoj.	3
Vivo de la Asocio.	7
Maljusta leĝo kaj esprimlibereco: tomisma kritiko pri punigo de malamparoladoj.	10
La koncepto pri "seka marbordo" en la Internacia Juro.	28
Juraj Informoj	38
Kiu rajtas esti membro de IJEA?	44
Novelo: <i>La jura diskuto inter Protagoro kaj Evatlo.</i>	45
Jura Vortaro	47
Galerio de Elstaraj Juristoj <i>"Adolf Halbedl"</i>	50
Kino kaj Juro <i>"Anatomio de falo"</i>	51

Ĉu tradukoj povas perfidi la justicon? La Artefarita Intelektto kaj la lingva breĉo en la internaciaj kortumoj

La lingvoj ne estas nur vehikloj por transigi la juron; la lingvo estas la juro mem. En internaciaj etosoj, kie traktatoj ligas suverenajn ŝtatojn kaj la tribunaloj juĝas translimajn krimojn, la lingva diverseco estas kaj riĉeco kaj kolosa defio. Sciante, ke organizaĵoj kiel UN, la Eŭropunia Kortumo aŭ la Internacia Pun-Kortumo, dependas de vera armeo de homaj tradukistoj kaj interpretistoj por garantii, ke la justeco ne haltiĝas antaŭ la Babel-turo.

Tamen, la apero de la Artefarita Intelektto (AI) iamaniere senbridigis kompletan aŭtomatigon de la interpretado kaj la tradukado ĉe tiuj internaciaj organizaĵoj. Tiel, sub promesoj pri efikeco, malpliigo de kostoj kaj rapideco, juraj sistemoj de la tuta mondo akceptas ĉi tiun ilaron, kiu faciligas la aŭtomatan tradukadon. Sed, ni scias, ke en la Internacia Juro, kie vorto ne trafe situata povas kaŭzi diplomatan konflikton aŭ eĉ ŝanĝi juĝon en kortumo, delegi la interpreton de teksto al algoritmo provokas maltrankviligan demandon, ĉu ni akcelas aplikigon de justeco aŭ ĉu ni reduktas la rajton je defendo?




Nuntempe oftas juraj procesoj kie intervenas tradukistoj

La rajto kompreni kaj esti komprenita: fundamenta piliero.

La principo pri lingva egaleco ne estas burokrata senmotiva volo, male, temas pri fundamenta homa rajto. La artikolo 14-a de la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Juroj proklamas, eksplicite, ke ĉiu homo akuzita je delikto rajtos esti senpage asistita de interpretisto, se li ne komprenas aŭ parolas la lingvon uzotan de la tribunalo.

Ĉe internaciaj kortumoj, ĉi tiu rajto multobliĝas. Ekzemple, la Eŭropunia Kortumo laboras kun 24 oficialaj lingvoj, ĉar oni efektivigas la rajton de kiu ajn eŭropunia civitano uzi sian propran lingvon. Ĝis nun la traduktado efektiviĝis pere de homaj tradukistoj kaj la reviziado de juraj lingvistikoj, do fakuloj pri filologio kaj juro.

Ebla anstataŭigo, aŭ eĉ unuanivela filtrado de ĉi tiuj procesoj pere de tradukado farita de la AI transformas tiun fundamentan juron en simpla plibonigo de datumoj.



La partio de la “lingva imperiismo” en IA

La granda teknika problemo de la Artefarita Inteljekto, kiam oni parolas pri tradukado de teksto en alian lingvon estas ties partio. La modeloj de AI ne “komprenas” la juron, ili nur kalkulas statistikajn probablojn pri io, pri kiu vorto devas sekvi alian, surbaze de la tekstoj per kiuj ili estis trejnitaj. Kaj ĝuste ĉi tie troviĝas la unua granda maljusteco: la cifereca ekosistemo estas profunde anglalingv-centra.

Lingvoj kiel la angla, la hispana aŭ la ĉina havas milionojn da paĝoj kun altkvalitaj datumoj, tre utilaj por trejni algoritmojn. Tamen, kiam internacia kortumo pritraktas kazon kie agadas sub-sahara afrikano parolanta etnan minoritatan lingvon, la Artefarita Inteljekto suferas la tiel nomatajn «halucinojn».

La softvaro emas pleni tiun mankon de datumoj en tiuj lingvoj pere de juraj konceptoj similaj al tiuj okcidentaj. Aperas, tiam, iaspeca lingva cifereca koloniismo. Do, la internacia juro, kiu devus celi protekti la diversecon, fine devigas tiujn jurajn sistemojn de ŝtatoj kun minoritataj lingvoj alĝustigi sin en la konceptoj de la ĉefaj lingvoj laŭ la IA.

La kritika efiko en procesoj pri azilo kaj migrado.

Alie, ekzistas etoso kie ĉi tiu afero ne estas teoria, male ĝi fariĝas reala problemo, temas pri procesoj pri azilo kaj rifuĝo. En la lastaj jaroj diversaj agentejoj pri migrada kontrolo en diversaj ŝtatoj komencis uzi maŝin-tradukilojn por transkribi kaj pritrakti la unuajn intervjuojn de la azil-petantoj.

Traduk-eraro en ĉi tiu afero povas esti mortkondamno. Ni vidu, en la jura lingvo diferenco inter la verboj “*persekuti*”, “*minaci*” aŭ “*diskuti*”, difinas ĉu homo rajtas ricevi la statuson de rifuĝinto laŭ la Konvencio de Ĝenevo. Specifaj idiomaĵoj rakontitaj en ne tro konataj dialektoj, povas esti tute ne-tradukeblaj por komerca traduka softvaro. Tiel, se la unua aŭtomatigita atesto kontraŭdiras postan deklaron pro eraro de la algoritmo, la homaj juĝistoj emas etikedi la petanton kiel “nekredindan”, kaj kompreneble neniu akceptas respondecojn rilate softvarajn mankojn aŭ erarojn.



Ĉiuj arestitoj rajtas esti informitaj, en lingvo de li komprenata, pri kio li estas akuzita. Se necese, li devas esti helpita de tradukisto.

Nuanco de vortoj kaj la danĝero de la Algoritma Jurisprudenco

Siate, ke en la internacia pun-juro la vortoj estas kirurgie precizaj. Konceptoj kiel “*krima intenco*”, “*eventuala dolo*”, aŭ “*devigo*” varias draste inter la kontinenta kaj la anglosaksa juroj. La AI povas traduki la vorton “posedaĵo” aŭ “kontrakto” facile, sed ĝi estas malkapabla konsideri la ĝustajn sencojn de tiuj terminoj en malsamaj jurisdikcioj.

Se la internaciaj tribunaloj komencas eldiri verdiktojn, decidojn kaj opiniojn bazitajn sur skizoj generitaj de AI, kiujn la juĝistoj revizias nur supraĵe, eble pro labor-troigo, ekzistas la risko normigi artefaritan jurisprudencon. Kaj en tiu jurisprudenco nuancoj de la homa lingvo, kiel la ironio, la timo, la dubo aŭ la intenca ambigueco de la diplomaciaj traktatoj, restos sub la kruta kompreno de la statistika laŭvorteco de la algoritmo.


Kompreneble la AI ne malaperos en la internaciaj tribunaloj, eĉ nei ties utilecon por akceli la tradukadon de pure administraj dokumentoj estus absurda. Sed la vera defio de la Internacia Juro en la 21-a jarcento ne estas malpermesi la teknologion, sed reguligi ĝin laŭ la principo “la homo regas”. La maŝintradukado devas esti konsiderata kiel helpa ilo por prepara laboro, neniam kiel deviga pruvo, nek kiel definitiva komunikilo inter tribunalo kaj civitano. La advokato de la estonteco devas ne nur regi la leĝojn de sia lando kaj la internaciajn traktatojn, li devas fariĝi kritika kontrolisto de la teknologio, kapabla revizii la lingvajn nuancojn de la algoritmoj kaj postuli, se la rajto je defendo danĝeras la ĉeeston de homa interpretisto.

La internacia justeco celas esti universala, kaj por atingi tion, oni devas memori, ke la universaleco ne baziĝas sur la devigo paroli la lingvon de la maŝinoj, sed garantii, ke neniu voĉo, sendepende de la nombro da parolantoj, estu silentigita de kod-eraro.

La redakcio de Jura Tribuno Internacia


Internacia Jurista Esperanto-Asocio

[I.J.E.A.](#) • [Revuo](#) • [Kursoj](#) • [Jura Vortaro](#) • [Statuto](#) • [Libroj](#) • [Universaliaj Tekstoj](#) • [Estraro](#) • [Jura Semajno](#) • [Paĝino en blanko](#) [Kontakto](#)




[Kio estas la Internacia Jurista Esperanto-Asocio](#)

2




[Jura Tribuno Internacia](#)
Oficiala organo de I.J.E.A.




[Vortaro](#)

Jura Terminologio



[Kursoj](#)

[Beta kurso pri Internacia Mar-Juro](#)



["Jura Semajno" Bulteno](#)



[Juraj Universalaj Tekstoj](#)

Ĉi tie vi trovos la tradukon en Esperanton de gravaj internaciaj juraj tekstoj.

www.esperantojuro.org



Vivo de la Asocio

► IJEA en sociaj retejoj.

Nia asocio Advok. Nelson di Blaco, de Argentino, ebligas kaj mastrumas la aperon de informoj pri nia socio en la esperantista retejo *NIA VIVO* kaj en *X* (eksa Tvitero). Ĉiusemajne sur ambaŭ retejoj li diskonigas novaĵojn kaj artikolojn jam aperintaj sur niaj publikigaĵoj.



<https://www.miavivo.net/profilo/jurista-esperanto/stream/>

► Daŭriĝas la ĉiusemajna aperado de *JURA SEMAJNO*.

Dum la pasintaj ses monatoj daŭriĝis la ĉiusemajna publikigado de nia bulteno “*JURA SEMAJNO*”. Ene de la bulteno aperas aktualaj informoj pri juraj aferoj, al kiuj aldoniĝas vorto rilata al juro kun ekzemplo. La bulteno ankaŭ utilas kiel kontaktilo por la membraro de la asocio. La bulteno estas sendata per interreto al ĉiuj membroj kaj simpatiantoj de la asocio. Ĝi ankaŭ aperas sur nia TTT-paĝo www.esperantojuro.org



JUĜO DE LA TRIBUNALO DE LA KORTUMNO RIFUZAS LA SEKRETEMON ĈE INSTITUCIO DE EUROPA UNIO

La postinta 19-a de junio la Tribunalo de la Kortumno de Eŭropa Unio diskonigas gravan juĝon, kiu farigas tute kontrar la sekretemon de la eŭropaj institucioj. La afero konsociĝis kiam la Eŭropa Prokurcejo ekeketis eblan agadon de kompanio. Dum la esplorado estis konstatita la necesa deklaro de funkcioj de la Eŭropa Revizora Kortumno, kiu krome devas havigi al la Prokurcejo internaj informoj de tiu Kortumno.



Tamen la Revizora Kortumno rifuzis tiun peton, ĉar laŭ la artikolo 19-a de la Statuto de la Funkcioj de Eŭropa Unio, funkcioj estas immuni, krome ili faras la debon grand kondiĉojn rilate savi laborojn. Do, oni sentis, fare de la Revizora Kortumno, ke diskonigi la petitan dokumentaron kaj la deklaron de funkcioj maltrikas la intereso de Eŭropa Unio. Kontraŭ tiu rifuzo la Eŭropa Prokurcejo prezentis la aferon antaŭ la Tribunalo de la Kortumno de Eŭropa Unio. Nun, tiu tribunalo maligis la decido de la Revizora Kortumno, asertante, ke la numero de la funkcioj ne estas sildu kontrar la diskonigo de la vereto; alie, la garantio de kredito funkcioj de la eŭropaj institucioj ne celus eviti la klarigo de eblaj deliktoj. Krome, laŭ ĉi tiu juĝo, la Revizora Kortumno ne rajtas decidi kiu estas presproleblaj aferoj.

Resume, ĉi tiu juĝo klarigas, ke neniu oficejo, organismo aŭ institucio de Eŭropa Unio trovigas super la Eŭropa Prokurcejo, se temas pri la enkutado de

► Kunvoko de Ĝenerala Asembleo de la Asocio.

Kadre de la venonta Universala Kongreso en Graz (Aŭstrio) de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto de 2026, ĉe la *Congress Graz, Sparkassenplatz 1*, okazos la ĝenerala asembleo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio, al kiu estas kunvokitaj ĉiuj membroj de la Asocio. La programo estas jena:

- Prelego pri la temo "La rajto je lingvo", fare de Advok. Miguel Faria de Bastos.
- Legado de la raporto pri la nuntempa situacio de la asocio.
- Prezento de la konto-stato de la asocio.
- Elekto de nova estraro de la asocio por la jaroj 2026-2029.
- Sugestoj kaj demandoj.

► Elekto de estraro por la periodo 2026-2029.

Kiel dirite, estraro devos esti elektita dum la ĉi-jara asembleo. La estraranoj nun elektotaj agados en sia oficoj ĝis la asembleo de la jaro 2029. La oficoj estas jenaj: *prezidanto, sekretario, kasisto kaj du senoficaj membroj.*

Ĉiuj ordinaraĵaj membroj rajtas esti elektitaj. Pere de la bulteno "Jura Semajno" oni sciigas al ĉiuj membroj la eblon prezenti sin kiel kandidatojn. Kompreneble, ankaŭ dum la asembleo kiu ajn ordinara membro povos kandidatiĝi al unu el la oficoj de la estraro.





Injustice anywhere is a threat to justice everywhere

MARTIN LUTHER KING Jr. (1929 / 1968)

Nobel-premiito, baptisma pastro kaj afrik-usona aktivulo, estro de la Afrikusona Civilrajta Movado.

*Maljustaĵo ie ajn estas minaco
por la justico ĉie.*

Maljusta leĝo kaj esprimlibereco: tomisma kritiko pri punigo de malamparoladoj.

Nelson di Blanco (Argentino)

L astatempe, la debato pri la tiel nomataj “malamparoladoj” akiris Lgravecon en diversaj mondpartoj, kaj manifestiĝis aparte per leĝoj aŭ leĝprojektoj, kiuj celas kontraŭbatali tiujn paroladojn pere de Kriminala Juro. Tamen, la punigo de tiaj esprimoj naskis gravajn polemikojn rilate al ilia legitimeco, proporcieco kaj kongruo kun esprimlibereco, unu el la fundamentaj rajtoj plej vaste agnoskataj kaj protektataj en la plimulto de nuntempaj juraj sistemoj.

Laŭ dokumentoj de la argentina Nacia Instituto kontraŭ Diskriminacio, Ksenofobio kaj Rasismo (malfondita en la jaro 2024), malamparoladoj estas sociaj diskursoj, kiuj disvastigas antaŭjuĝojn kaj negativajn stereotipojn por pravigi, legitimi aŭ instigi malamikecon, diskriminacion aŭ socian perforton kontraŭ apartaj grupoj. Kvankam ili ne ĉiam kondukas al rekta fizika perforto, ili enhavas fortan simbolan perforton, kiu damaĝas la socion kaj la demokratian kunvivadon.



Aliflanke, la angla organizaĵo Article 19 (2015) atentigas, ke ankaŭ neadismaj paroladoj ofte funkcias kiel rimedo por pravigi malamon kontraŭ viktimoj aŭ pluvivintoj de historiaj krimoj. Tamen, la organizaĵo substrekas, ke oni devas distingi inter la protekto de la rajtoj de personoj kaj la defendo de “oficiala vero” kiel bazo por limigi esprimliberecon.

En tiu kunteksto, la tomisma filozofio, forte influita de Aristotelo, povus alporti taŭgajn ilojn por kritike analizi aktualajn jurajn kaj etikajn problemojn. Jena teksto celas pristudi la debaton pri la punigo de malamparoladoj el la

vidpunkto de Tomaso de Akvino (Italio, 1225 – 1274), precipe surbaze de lia teorio pri maljusta leĝo, kaj de liaj distingoj inter la interna kaj la ekstera forumo, lia koncepto pri “komuna bono” kaj lia teorio pri virtoj, kiel alternativo al troa uzo de Kriminala Juro.



Tomaso de Akvino
1225 ~ 1274

La kerna demando estas: ĉu estas justa kaj jure akceptebla, el tomisma vidpunkto adaptita al nuntempaj defioj, la punigo de malamparadoj? La proponata hipotezo asertas, ke, utiligante la tomisman teorion pri la maljusta leĝo, oni povas konkludi, ke vasta punigo de malamparadoj estas maljusta, ĉar ĝi misproporcie limigas esprimliberecon kaj negative influas la komunan bonon. La uzota metodologio estos ĉefe refleksiva, bazita sur originalaj tekstoj de Tomaso de Akvino aplikataj al la nuna kunteksto, kaj kompletigita per kritika analizo de kelkaj aktualaj doktrinoj kaj jurisprudenco rilataj al la temo.


La artikolo konsistas el kvar ĉefaj partoj: teoria kadro bazita sur la fundamentaj tomismaj konceptoj; nuntempa doktrina kaj jurisprudenca analizo; kritika diskuto aplikanta la tomisman filozofion al la aktualaj debatoj; kaj fina esploro pri alternativoj bazitaj sur la tomisma pensado.

Teoria kadro.

La tomisma koncepto pri “maljusta leĝo” baziĝas sur kongruo inter pozitiva leĝo kaj natura leĝo, ĉiam celante komunan bonon (Akvino, 1989, ĉ. 90, art. 2). Tomaso de Akvino ligas leĝon kaj justecon kun virto kaj homa bono; li sekvas Aristotelon kaj rimarkigas: ke homa virto bonigas kaj la homan agon kaj la homon mem (ĉ. 55, art. 3); ke justeco ĝustigas homajn agojn; kaj ke la leĝo direktas agojn de ĉiuj virtoj al la komuna bono. Tiel, eblas interpreti, ke justa leĝo antaŭenigas bonecon kaj virton, kaj individue kaj komunume. Sekve, justa leĝo devas krei sociajn kaj moralajn kondiĉojn, kiuj ebligas al la komunumo atingi sian finan celon: la plenan disvolviĝon de la homa vivo virta kaj racia.

Male, leĝo estas maljusta, kiam ĝi kontraŭas la naturan juron aŭ kiam ĝi celas ekskluzive apartajn interesojn malprofite al komuna bono. Krome, li klarigas, ke leĝoj, eĉ ĝuste starigitaj, povas malsukcesi en iuj apartaj kazoj; tial, “oni ne devas juĝi laŭ la sola teksto de la leĝo, sed konsiderante egaligon” (Akvino, 1990, ĉ. 60, art. 5). Menciindas ke “egaligo”, laŭ Aristotelo, estas “la rektigo de la leĝo tie kie ĝi montriĝas nesufiĉa pro ĝia universala karaktero”. Tio subtenas la ideon, ke leĝo aŭ ĝia aplikado povas esti maljusta, se ĝi trudus tro pezajn aŭ misproportciajn ŝarĝojn, kiuj kontraŭas la bonon de la komunumo aŭ la justecon. Maljusta leĝo, laŭ Tomaso, “ne havas forton por devigi”; tial ĝi ne havas devigan legitimecon, do konklude, en tiaj cirkonstancoj malobeo estus pravigebla.

Ŝlosila distingo, kiun Tomaso de Akvino proponas por pritaksi la justecon de la leĝoj, estas tiu inter la interna kaj la ekstera forumo. La interna forumo rilatas al privata konscienco kaj individua moraleco. Ĉe Akvino (1990), demando 60, artikolo 3, la “necertaj opinioj pri io malbona”, kiuj devenas de la pasioj, estas traktataj kiel internaj juĝoj, kaj “pro tio ke la justeco kaj la maljusteco rilatas al eksteraj agoj”, sekve, “suspektema juĝo rekte apartenas al maljusteco, kiam ĝi koncernas eksterajn agojn”, dum “interna juĝo apartenas al justeco nur tiomgrade, kiom ĝi rilatas al ekstera juĝo”.



Imaga bildo de Aristotelo apud Tomaso de Akvino

Male, justeco “ne rilatas al la tuta materio pri la morala virto, sed nur al eksteraj agoj kaj aferoj, laŭ aparta konsidero de la objekto, tio estas, laŭ tio, ke per ili unu homo ordigas sin rilate al alia” (ĉ. 58, art. 8). Nome, la ekstera forumo rilatas al observeblaj kondutoj, objekte reguligeblaj per Juro, kiel objekto de justeco.

Dirinte, ke la objekto de justeco estas la eksteraj agoj, kiuj rilatas al alia persono, oni konkludas ke la jura interveno devus limiĝi al tiuj eksteraj agoj, kiuj havas observeblan efikon al aliuloj aŭ al la komunumo entute. Se justeco kaj leĝo fokusiĝas je eksteraj agoj kaj je la rilato kun la aliaj homoj, celante komunan bonon, tial, la reguligado de tio, kio estas pure interna afero kaj ne influas nek aliulon nek la komunan bonon, restus ekster ilia legitimeco. Tiu ĉi aliro al justeco, koncentrita je la ekstera sfero, ebligas sugestii, ke la interna sfero apartenas al aliaj moralaj virtoj kaj ne rekte al la pozitiva juro. Oni povas do interpreti, ke troa jura regulado de la interna forumo, estante ekskluziva kampo de individua moraleco, estus maljusta, ĉar ĝi malrespektas moralan aŭtonomecon kaj transpasas la legitimajn limojn de politika aŭtoritato.

Oni povas utiligi tiujn kernajn konceptojn de la tomisma pensado, kiel la nocion pri komuna bono, la distingon inter interna kaj ekstera forumo, kaj la kadron por legitime apliki juron, (laŭ Tomaso, “objekto de la Justeco”), por analizi kaj interpreti nuntempajn debatojn. En moderna kunteksto, la publika debato kaj la civitana partoprenado estus raciaj rimedoj, per kiuj la diversaj partoj kontribuas al la bono ĝenerala. Oni povus do hodiaŭ aserti, ke la efektiva serĉado de la komuna bono postulas, ke la homaj leĝoj konservu fundamentajn liberecojn, inter ili esprimliberecon, kiu estas nemalhavebla rimedo por publika debato, civitana partoprenado kaj kolektiva serĉado de la vero. Tial, troaj aŭ misproportiaj limigoj de tiu libereco ne nur mallegitime enrudigis en la internan forumon, sed ankaŭ negative influus la socion entute, malriĉigante la komunuman vivon kaj misformante la demokratian socian teksaĵon.



Fine, laŭ la tomisma pensado, “la virtoj de la homoj direktitaj al bono, kies mezurojn starigas la regulo de la homa racio, povas esti kaŭzata de homaj agoj” (Akvino, 1989, ĉ. 63, art. 2). Li indikas, ke “homa ago estas bona, se ĝi submetiĝas al la regulo de la racio, laŭ kiu la homaj agoj ĝustigiĝas. Kaj ĉar la justeco ĝustigas la homajn agojn, estas evidente, ke ĝi bonigas la agon de la homo” (Akvino, 1990, ĉ. 58, art. 3); kvankam la ĝustigo de agoj, “pro tio ke ili finiĝas en eksteraj aferoj, apartenas al justeco” (ĉ. 58, art. 9): li cetere emfazas, ke la ĝustigo de agoj “kiuj devenas de la pasioj apartenas al aliaj moralaj virtoj, kies objekto estas la pasioj”.

El tiu perspektivo, aplikita al la kunteksto de nuntempaj debatoj, indas konsideri, ke la interna morala fortigo de individuoj kaj komunumoj estus multe pli efika ol la minaco de eksteraj punoj, precipe kiam ĉi-lastaj povas montriĝi arbitraj aŭ maljustaj en sia aplikado. Tiel, la kultivado de virtoj pere de etikaj kutimoj povus esti preferinda alternativo al la ĝeneraligita uzo de punaj rimedoj por instigi socie dezirindajn kondutojn.



Nuntempa doktrina kaj jurisprudenca analizo.

La nuntempa doktrino pri malamparolado oscilas inter du argumentaj polusoj: vidpunktoj plejparte favoraj al regulado kaj vidpunktoj plejparte favoraj al libereco. En la unua vidpunkto, aŭtoroj kiel Cristina Güerri Fernández (2015) defendas la intervenon de Kriminala Juro kiel legitiman kaj tre gravan mekanismon por batali kontraŭ malamdeliktoj. Ŝia esploro emfazas, ke malamdeliktoj influas ne nur la viktimon mem, sed ankaŭ la komunumon, starigante “sentojn de nesekureco, malakcepto kaj eĉ malalta memestimo”, kaj konsekvence “negativajn implicojn por socia kohereco kaj por la integriĝo de malplimultuloj”. Tio naskus la neceson protekti medion, en kiu personoj povos interagi sen humiligo. Ŝi aparte emfazas la “preventan funkcion” de la krimjura interveno.

En vidpunkto pli favora al libereco, troviĝas aŭtoroj kiel Ronald Dworkin, kies verkaro estis analizita de pluraj aliaj aŭtoroj. Manuel Toscano (2022) koncizigas la centran argumenton de Dworkin: la graveco protekti eĉ ofendajn aŭ socie maltrankviligajn esprimojn kuŝas en tio, ke ilia krimigo subfosas la diskutigan funkcion de demokratio. Laŭ tiu interpreto, Dworkin atentigas, ke starigi punon kontraŭ simple ofendaj esprimoj transigas al la ŝtato la respondecon juĝi moralecon, kaj tiel malinstigas publikan liberecon. Tio ne nur kompromitas la diskutigan esencon de demokratio, sed ankaŭ misformas la respondecon pri morala argumentado, kiu devus aparteni al la komunumo kaj ne al la puna aŭtoritato. En Argentino, aŭtorino Anna Richter (2022) emfazas, ke krimjura interveno devas limiĝi al parolado, kiu konsistigas apologion de delikto, rektan instigon al perforto aŭ esprimon de etna aŭ religia supereco, kaj avertas pri la arbitreco, kiun pli vasta aplikado povus estigi; tial ne ĉiu ofenda esprimo devas esti krimigita.



Oni prenu ekzemplajn modelojn pri la afero en grava internacia jurisprudenco. Rilate al tio, la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj starigis en siaj verdiktoj kelkajn ŝlosilajn konceptojn. Ekzemple, en *Handyside v. United Kingdom* de 1976 (Global Freedom of Expression, sen dato), la kortumo deklaris, ke esprimlibereco “validas ne nur por informoj aŭ ideoj favore akceptataj aŭ konsiderataj sendanĝeraj aŭ indiferentaj, sed ankaŭ por tiuj, kiuj ŝokas, maltrankviligas aŭ ofendas la Ŝtaton aŭ iun ajn parton de la loĝantaro”, kaj ĝi permesis limigojn nur se ili estas “necesaj en demokratia socio”. Siaflanke, la Supera Kortumo de Usono, en la fama verdikto *Brandenburg v. Ohio* de 1969, adoptis la kriterion hodiaŭ konatan kiel la teston pri instigo al tuja kontraŭleĝa ago: esprimo povas esti punata nur se ĝi estas “direktita al instigo aŭ okazigo de tuja kontraŭleĝa ago” kaj probable kaŭzos tion (Grau Álvarez, 2021). Tiu normo plu estas konsiderata nepra referenco en la usona jurisprudenco kaj montras vidpunkton tre favora al protekto de esprimlibereco.

En Argentino, la plej alta federala tribunalo (Supera Kortumo de Justeco de la Nacio, 2024) evoluigis doktrinojn forte protektantaj la ekzercadon de esprimlibereco, precipe pri aferoj de publika intereso. La Kortumo konsideras, ke gazetara libereco havas apartan gravecon, tiomgrade ke sen ĝia taŭga protekto ekzistus nur malfortigita aŭ pure formala demokratio. La konstitucia protekto de tiu rajto estas aparte intensa rilate al aferoj de publika intereso. La Supera Kortumo agnoskis, ke kritiko, eĉ kiam ĝi estas akra kaj pasia, aŭ esprimita en agresema tono, kun troa emfazo, severece aŭ mordeco, kaj uzante incitajn, malglatajn aŭ malamikajn esprimojn, apartenas al la legitima praktikado de moderna ĵurnalismo kaj ĝuas konstitucian protekton. Eĉ esprimoj, kiuj ŝokas, incitas aŭ maltrankviligas publikajn funkciulojn aŭ iun ajn sektoron de la loĝantaro, estas protektataj, ĉar ĉiu plurisma kaj diversa socio bezonas demokratian debaton. Kritikaj opinioj perdas konstitucian protekton nur en limigitaj esceptaj kazoj, ekzemple kiam oni invadas la privatan vivon de la ofendito kun la ĉefa celo damaĝi onian honoron aŭ kaŭzi ian ajn malutilon.

El la doktrina kaj jurisprudenca superrigardo rezultas serio da kondiĉoj, kiuj povus legitimigi la punan intervenon kaj kiuj kongruas kun la tomisma teorio pri justa leĝo: grava ekstera damaĝo, laŭ kiu la esprimo nepre devas serioze minaci fundamentajn jurajn bonojn (nuraj ofendoj al la interna forumo ne sufiĉas); tujeco kaj klara kaŭza konekso, tiel ke devas ekzisti rekta ligo inter la parolado kaj la probableco de perfortaj aŭ kontraŭleĝaj agoj; neceso kaj subsidiareco, kiuj implicas, ke puno estas uzebla nur se aliaj malpli damaĝaj rimedoj montriĝas nesufiĉaj por neŭtraligi la riskon.



Resume, tiuj kondiĉoj kongruas kun la tomisma doktrino: justa leĝo direktiĝas al objektivaj kondutoj, kiuj damaĝas la komunan bonon; male, punigo de pure ofendajn esprimojn influas la internan forumon kaj estus do, maljusta leĝo. Tiu interpreto, plifortigas la hipotezon, ke vastaj kaj ĝeneralaj krimjuraj normoj kontraŭ malamparoladoj estas nekongruaj kun la principoj de justeco, proporcieco kaj komuna bono postulataj de la filozofio de Tomaso de Akvino.

3. Kelkaj pripensoj el tomisma filozofio aplikataj al la aktuala debato.

3.1. La teorio pri maljusta leĝo.

Tomaso de Akvino konceptas la homan leĝon kiel “ordonon de la racio por la komuna bono, promulgitan de tiu, kiu zorgas pri la komunumo” (Akvino, 1989, ĉ. 90, art. 4). Tiu difino, kiu resumas liajn ĉefajn tezojn, implicas, ke la leĝo estas juĝo de la racio, funkcianta kiel regulo kaj mezuro de la homaj agoj; ĝi estas “universalala propozicio de la praktika racio”, kiu celas ordigi la agojn al certa celo (ĉ. 90, art. 1). Laŭ Tomaso de Akvino, el tiu antaŭsupozo sekvas tri nepraj postuloj por ke la homa leĝo estu justa kaj valida: konformeco al la natura leĝo, celado al la komuna bono, kaj respekto de proporcieco kaj neceso.

Koncerne la unuan el tiuj postuloj, laŭ Tomaso la homa leĝo devas kongrui kun la natura leĝo, tiel ke pozitiva normo estas nevalida, se ĝi kontraŭas la universalajn preskribojn de la praktika racio. Tomaso komprenas la naturan leĝon kiel partoprenon de la dia racio en la homa racio, kiu ebligas al la homo direkti siajn agojn al sia fina celo (ĉ. 91, art. 2). Ĝi enhavas principojn memkompreneble evidentajn, el kiuj la unua kaj fundamenta estas “fari la bonon kaj eviti la malbonon” (ĉ. 94, art. 2); tamen Tomaso malfermas ankaŭ la pardonon al aliaj principoj, derivitaj el komuna konsento, ĉar “la homa volo, per komuna interkonsento, povas fari ion justa en tiuj aferoj, kiuj per si mem ne kontraŭas la naturan justecon” (Akvino, 1990, ĉ. 67, art. 2). Se “skribita leĝo enhavas ion kontraŭ la natura juro, ĝi estas maljusta kaj ne havas forton por devigi” (ĉ. 60, art. 5).

Laŭ nuntempaj terminoj, eblas interpreti, ke la pozitiva juro, por esti legitima, devus enradikiĝi en universalaj etikaj principoj kaj fundamentaj rajtoj, kiujn la homa racio kapablas distingi; iuj el ili povus esti validaj en ĉiu tempo kaj loko, dum aliaj estus produkto de la superrega konsento en difinita epoko. Leĝo, kiu radikale malobservus tiujn principojn, malhavas veran moralan kaj juran devigan forton; tia normo estus pli “koruptiĝo de la leĝo” ol vera normo.

Samtempe, kiel dua postulo, la leĝo devas celi objektivan socian bonon kaj ne nur la politikan oportunon de iu sektoro. Tomaso citas Izidoron de Seviljo kaj asertas, ke la leĝo “ne estis skribita por aparta profito de iu ajn, sed por la komuna utilo de la civitanoj” (Akvinio, 1989, ĉ. 90, art. 2). Krome, se la laŭlitera aplikado de leĝo en aparta kazo montriĝus malutila por la komuna bono (ĉ. 96, art. 6), oni devas sin turni al la “egaliĝo”, kiu serĉas la celon de la leĝo antaŭenigi la bonon (Akvinio, 1990, ĉ. 60, art. 5). El tio eblas interpreti, ke leĝaro devas havi senpartian kaj altruistan karakteron, kaj celi la kolektivian bonfarton super la interesoj de apartaj grupoj aŭ individuoj. Ĝia funkcio estus maksimumigi la bonfarton de la socio entute, kaj en esceptaj situacioj la racio permesus devojiĝi de la laŭlitera enhavo de la normo, se ĝia strikta plenumo endanĝerigus la finan celon de la leĝo.



Santa Izidoro de Seviljo. 560 ~ 636

Fine, la leĝo devas plenumi la principojn de proporcieco kaj neceso; tio implicas ke la elektotaj rimedoj devas esti taŭgaj kaj kiel eble plej malmulte ŝarĝaj por atingi la proponitan celon. La homa leĝo devas esti “proporcia al la komuna bono” (Akvinio, 1989, ĉ. 96, art. 1) kaj “devas adaptiĝi al la konvenaj cirkonstancoj, kaj tial oni diras, ke ĝi estas proporcia al la lokoj kaj al la tempoj” (ĉ. 95, art. 3). Ĝi devas ankaŭ esti necesa (“ke ĝi evitu malbonojn”), utila (“ke ĝi antaŭenigu bonojn”) kaj klara (“ke ĝi antaŭgardu damaĝojn, kiuj povus deveni el la leĝo mem”). Oni konsideru la kapablon de la subjektoj kaj evitu trudon de troaj ŝarĝoj, kiujn la homoj ne povas aŭ ne pretas plenumi, ĉar tio povus konduki al malobeoj kaj pli grandaj malbonoj (ĉ. 96, art. 2). Krome, ŝanĝoj en la leĝoj ne estu farataj pro ajna avantaĝo, sed nur pro “granda kaj evidenta utilo” (ĉ. 97, art. 2), ĉar kutimo donas grandan forton al la observado de la leĝo.

Nuntempe, tiu lasta principo povas servi por subteni efikan kaj prudentan leĝaron, celantan minimumigi la ŝarĝon sur la civitanoj, antaŭenigi la liberecon de la individuo fronte al la ŝtato, kaj respekti la kutimojn kaj la kapablon de la homoj plenumi la leĝon. Tio implicus leĝdonan prudenton, kiu evitu troan reguladon kaj garantiu, ke la normoj estu klaraj, kompreneblaj kaj stabilaj. Ili estu modifitaj nur kiam evidenta kaj grava neceso aŭ utilo tion pravigas, kio ankaŭ favoras juran sekurecon.



La Leĝo Eterna estas skribita en la koro de l'homoj.

(Tomaso de Akvino)

Aplikate al la problemo de malamparoladoj, tiuj kriterioj ebligas ekzameni la krimjurajn leĝojn, kiuj ilin punas, sub la lumo de la tomisma pensado. Konforme al la praktika racio, oni povus aserti, ke la nura esprimado de ideo (eĉ ofenda aŭ malestiminda) ne estas, per si mem, ago kontraŭ la komuna bono kaj la komuta justeco. Tio kongruas kun la tomisma koncepto de justeco kiel tiu virto, kiu ordigas la homon en aferoj rilataj al la aliaj. Grave, la propra kampo de justeco konsistas el eksteraj agoj kaj aferoj; sekve, la nura esprimado de ideo, se ĝi ne transformiĝas en eksteran agon, kiu rompas egalecon aŭ kaŭzas objektivan damaĝon al alia persono en la senco rilata al justeco, ne rekte apartenus al la kampo de justeco.

Oni starigu kiel unuan kondiĉon por la interveno de la homa leĝo, iun certan kaj gravan damaĝon al aliuloj; rilate al graveco, la homa leĝo ne malpermesas ĉiujn malvirtojn, sed “nur la plej gravajn, tiujn, de kiuj la plimulto povas sin deteni kaj kiuj, ĉefe, damaĝas aliajn, ĉar sen ilia malpermeso la homa socio ne povus ekzisti” (ĉ. 96, art. 2). Tio montras, ke la pozitiva leĝo celas konservi la socian ordon kontraŭ la plej damaĝaj malbonoj, sed ne kontraŭ ĉiuj neperfektaĵoj aŭ ofendaj esprimoj, kiuj ne kaŭzas konkretan kaj gravan damaĝon.

Puni “ofendon” sen kaŭza konekso kun konkreta damaĝo, konfuzas pekon (aŭ, en sekularaj terminoj, etike riproĉindan agon) kun delikto (jure punebla ago), kaj transigas al la jura ordo tion, kion Tomaso rezervas al la

forumo de la konscienco. Tiu interpreto kongruas kun la limoj kaj celoj, kiujn Tomaso de Akvino atribuas al la homa leĝo: ĝi ne estas destinita ampleksi la tutan individuan moralecon aŭ ĉiun etike riproĉindan agon, sed konservi la komunan bonon pere de la regulado de eksteraj agoj, kiuj grave influas socian kunvivadon.

Aliflanke, se la ofte deklarata celo de la leĝoj, kiuj punas malamparoladojn, estas konservi dignon kaj pacan kunvivadon, oni devus empirie montri, ke punigo efektive atingas tiun celon. Se puno ne montriĝas efika rimedo por atingi tiun koncepton de komuna bono (konservi dignon kaj pacan kunvivadon), aŭ se ekzistas malpli damaĝaj vojoj, la leĝo ne plenumus la principojn de neceso kaj proporcieco; en tiuj kondiĉoj, la leĝo perdis sian ekzistorajton kaj sian sencon de justeco, same kiel sian utilecon: ĉio kio laŭ la tomisma pensado pravigus ĝian forlasadon. La puna respondo estas kvalite multe pli ŝarĝa ol monaj aŭ administraj rimedoj; tial, por esti legitima, la krimjura solvo devus limiĝi al ekstremaĵoj (rekta kaj tuja instigo al perforto), en kiuj la damaĝo al la komuna bono estas tiel probabla kaj severa, ke neniu alia rimedo montriĝas taŭga. Sekve, vastaj krimjuraj normoj, kiuj punas la esprimon de malamo kiel tian, aŭ nur vortan malestimon, ne kontentigas la kriteriojn de racieco kaj proporcieco, kaj tial devas esti konsiderataj maljustaj leĝoj.

3.2. La distingo inter interna forumo kaj ekstera forumo, kaj ĝia praktika graveco.

Kiel menciite en la teoria kadro, Tomaso distingas inter la interna forumo (la konscienco, la intenco) kaj la ekstera forumo (la objektive perceptebla konduto submetebla al jura juĝo). Juro, pro sia truddeviga naturo, direktiĝas al la ekstera kampo. La homa leĝo, laŭ sia propra naturo, havas truddevigan forton bazitan sur la “timo antaŭ puno”, por instigi al virto kaj certigi la socian pacon (Akvino, 1989, ĉ. 95, art. 1). Tomaso ankaŭ atentigas, ke la homa leĝo “ne sukcesas sufiĉe subigi kaj ordigi la internajn agojn” (ĉ. 91, art. 4). Pri malamparoladoj, kiam la esprimo konsistigas nur internan konvinkon vortigitan, la ofendo trafas ĉefe la moralan sferon. La malbono, kvankam reala, estas subjektiva kaj ne aŭtomate transformiĝas en mezureblan damaĝon al komuna bono. Puni tion signifus puni pensadon mem, kion Tomaso konsiderus neakceptebla, ĉar tio estus uzurpo de la dia povo kaj de la interna juĝo.

Krimjura interveno fariĝus legitima nur kiam la parolado transpasas la eksterajn limojn. La merito aŭ malmerito, fundamento de la retribua justeco, aperas kiam oni “agas profite aŭ malprofite al alia” (ĉ. 21, art. 3); tia estus la kazo de parolado, kiu klare kaj konkrete instigas fari gravan delikton, tiel ke


la minaco kontraŭ la socia paco fariĝas tuja kaj provebla. Nur en tiaj okazoj plenumiĝus la antaŭe analizitaj kondiĉoj de objektiva damaĝo, apartigita de la interna forumo kaj objekte konstatebla. Tiu distingo ebligas apartigi du nivelojn: la moralan ĝustecon (kiu povus esti traktata per edukado al virtoj) kaj la juran protekton, kiu devus aktiviĝi nur fronte al palpebla ekstera risko.

Tiel, eblas interpreti, ke la pensado de Tomaso de Akvino, distingante inter la interna kampo de la moralo kaj la ekstera kampo de la juro, proponas fortikan kadron por limigi la punan intervenon rilate al malamparoladoj. Nur kiam la esprimo transformiĝas en agon (aŭ instigon al ago), kiu kaŭzas objektivan, klaran, tujan kaj proveblan damaĝon al la komuna bono, la homa leĝo trovas legitimajn kialojn interveni. Alie, oni invadus la konsciencan forumon.

3.3. Efiko de la vasta uzo de punigo sur la komuna bono.

Paradokse, la leĝoj, kiuj punas malamparoladojn aŭ neadismajn paroladojn, samtempe kiam ili celas protekti kolektivian dignon aŭ tiun de vundeblaj aŭ minoritataj grupoj, povas fine subfosi superajn bonojn, kiuj konsistigas la komunan bonon. En la tomisma pensado ĉiu leĝo direktiĝas al la komuna bono. Se leĝo, en sia aplikado, kontraŭas aŭ subfosas bonojn, kiuj estas konsistigaj aŭ esencaj por tiu komuna bono, ĝi fariĝas problema jam ĉe sia radiko.

Inter la plej gravaj superaj bonoj, troviĝas hodiaŭ esprimlibereco. Kvankam Tomaso de Akvino ne parolis pri “esprimlibereco” en la moderna senco, li emfazas la gravecon alfrontadi ideojn por atingi praktikan veron, ĉar “por atingi la konon de io certa, necesas konsideri multajn kondiĉojn kaj cirkonstancojn, kiujn ne facile povas konsideri unu sola homo, sed kiujn multaj perceptas pli certe” (Akvino, 1989, ĉ. 14, art. 3). Tio sugestas, ke sistemo, kiu subpremas debaton pri opinioj (eĉ eraraj, kondiĉe ke ili ne kaŭzu tujan eksteran damaĝon), kontraŭas la manieron laŭ kiu la homa racio funkcias por distingi



Summa Theologica, verkita kiel manlibro por komencantaj kateĥismo-instruistoj.

praktikan bonon en kompleksaj situacioj. Sistemo aŭ normaro, kiu krimigas malamindajn opiniojn sen postuli kaŭzan koneksojn kun objektiva damaĝo, margenigas malsamopiniajn voĉojn kaj malriĉigas la publikan debaton.

Alia grava sekvo de tiuj leĝoj estas civitana malfido kaj memcenzuro. Kulturo, kiu antaŭenigus troan punadon de opinioj (sen konkreta kaj pruvebla ekstera damaĝo), povus instituciigi etoson de ĝeneraligita suspekto, kiu erozias la civitanan fidon. Tiel, la minaco de puno instigas troan sindetenon kaj kulturon de silento, kaj malfortigas la socian kunligitecon, kiun oni celis fortigi; ĝi do kontribuas al subfosado de la demokrata strukturo de la socio. Tio ne kongruas hodiaŭ kun la komuna bono aŭ kun virta vivo en komunumo. Krome, tro vasta difino de deliktoj lasas al la arbitra libervolo de la reganto decidi, kiuj ideoj kvalifikiĝas kiel “malamaj”, tiel malfermante la pordon al persekutado de kontraŭuloj aŭ eĉ al subpremado de malplimulto.



La tomisma doktrino, kiam oni aplikas ĝin kohere al nuntempaj defioj kiel fenomeno de malamparoladoj, sen perdi ĝian esencon, kondukas al postulema kaj limiga kriterio: nur tiu parolado, kiu transpasas la internan forumon kaj konsistigas gravan, tujan kaj pruveblan eksteran danĝeron, estu legitime subpremata per Kriminala Juro; ĉio alia apartenas al la morala sfero aŭ al la plurisma publika debato. La nuntempaj leĝoj, kiuj krimigas nur ofendajn esprimojn sen pruvi tian danĝeron, malrespektas la proporciecon, uzurpas la individuan konsciencon kaj, fine, montriĝas maljustaj leĝoj. Tiukaze, oni devus korekti la leĝojn aŭ, se necese, prudente malobei tiajn normojn favore al rimedoj pli kongruaj kun la komuna bono kaj kun la digno de la racia kaj libera homo.

4. Tomismaj alternativoj al punigo de malamparoladoj.

La tomisma tradicio ne konceptas moralan korektadon ekskluzive kiel agon de nura ekstera trudado fare de la leĝoj, sed antaŭ ĉio kiel la akiron de virtaj kutimoj, kiuj perfektigas la praktikan racion. Aplikita al la problemo de malamparoladoj, tiu logiko povus anstataŭigi la fokuson, el la minaco de puno al publikaj politikoj, celante kultivado de virtoj. Tiuj celoj, hodiaŭ trovas paralelon en la tendencoj de restaŭra justeco kaj en pedagogiaj programoj por preventi diskriminacion.



**Nacia Instituto
kontraŭ la Diskriminacio
la Ksenofobio kaj la Rasismo**

En la argentina eduksistemo jam funkciis iniciatoj, kiuj respondis al tiu paradigmo. La malfondita INADI (Nacia Instituto kontraŭ Diskriminacio, Ksenofobio kaj Rasismo) publikigis la gvidlibron “Somos iguales y diferentes”, tio estas, “Ni estas egalaj kaj malsamaj” (INADI, 2011), kun ekzercoj celantaj formi empatian kaj recipokan respekton ene de la klasĉambro, emfazante, ke la unua baro kontraŭ perforto estas la ĉiutaga kutimo por inkluzivado.

Tiuj strategioj, bazitaj sur parolado, rezonado kaj kunlabora interagado, reprezentas la tomisman konvinkon, ke virto ekestas el la ripetado de bonaj agoj prefere ol la timo antaŭ puno. Kvankam ankoraŭ ne ekzistas unuforma statistika mezurado, estus atendeble, ke la institucioj, kiuj enkondukas gvidatajn diskutspacojn, perdon inter samranguloj kaj dialogajn protokolojn fronte al diskriminaciaj okazintaĵoj, reduktu situaciojn de vorta agreso kaj ekskludo; tiel oni povus subteni la tomisman intuicion, ke morala formado, aplikata pere de pedagogiaj kaj restaŭraj rimedoj, povas esti pli efika ol la minaco de punigo por ekstermi la socian radikon de malamparolado.

Sama logiko inspiras la evoluon de la tiel nomata “restaŭra justeco” en la kriminala sistemo, antaŭenigante renkontiĝojn inter ofendintoj kaj viktimoj aŭ damaĝitaj komunumoj, por ke la agresinto alprenu respondecon, riparu la damaĝon kaj ricevu edukan kaj psikologian subtenon. Tio celas anstataŭigi la retribuan punon per procezo de repaciĝo gvidata de spertoj.

La kombino de etika formado, komunuma partoprenado kaj restaŭraj rimedoj povus ataki la radikon de la problemo tie, kie la krimleĝoj nur silentigas

simptomajn. Uzante tomismajn terminojn, oni nutras la internan forumon per virtaj dispozicioj kaj sanigas la eksteran forumon sen detrui la respondecan liberecon, kiu ebligas la politikan vivon. Tiel, la perspektivo de Tomaso de Akvino konverĝas al nuntempaj postuloj: Juro vere orientita al komuna bono, kiu rezervus punon por tuja perforta instigo kaj konfidus daŭran transformadon de la konsciencoj al edukaj politikoj, restaŭraj praktikoj kaj dialogaj spacoj; nome, tio kio, antaŭenigante civitajn virtojn, povus preventi malamon pli efike ol iu ajn minaco de malliberpuno.

5. Konkludoj.

Ĉi tiu esploraĵo celis respondi la demandon, ĉu el tomisma perspektivo adaptita al nuntempaj defioj, la vasta punigo de malamparoladoj estas justa kaj jure akceptebla. Pripensado, bazita sur la teorio de la maljusta leĝo, la tomisma distingo inter interna kaj ekstera forumoj, kaj lia koncepto pri la komuna bono kaj la virto, ebligis atingi serion da gravaj konkludoj.

Unue, por Tomaso de Akvino la legitimeco de leĝo dependas de ĝia kongruo kun la natura leĝo, de ĝia orientiĝo al komuna bono, kaj de ĝia proporcieco kaj neceso. Aplikite al la nuna debato, eblas tiel interpreti, ke vasta punigo de malamparoladoj kontraŭas tiujn kriteriojn, ĉar, troe limigante la esprimliberecon, ĝi ne efektive kontribuas al komuna bono nek respektas la moralan aŭtonomecon de individuoj; tio do, konsistigus “maljustan leĝon” laŭ la tomismaj kriterioj.

Krome, la distingo inter interna kaj ekstera forumoj estis ŝlosila por reliefigi la enecan maljustecon de la kriminala regulado de pure internaj aŭ subjektivaj opinioj aŭ esprimoj. Juro rajtas interveni legitime nur kiam ekzistas konkreta, ekstera kaj grava damaĝo kontraŭ aliaj. Tiu doktrina precizigo alportas valoran kritikan ilon por taksi nuntempajn leĝojn, kiuj povas konduki al nepravigeblaj cenzuroj.

Sekve, la komence proponita hipotezo montriĝis konfirmita: el tomisma perspektivo adaptita al la nuntempaj cirkonstancoj, la vasta punigo de malamparoladoj estas maljusta, ĉar ĝi misproporcie limigas la esprimliberecon kaj ne efike protektas la komunan bonon.

La nuna artikolo provis montri, kiel klasikaj doktrinoj, ekzemple tiu de Tomaso de Akvino, proponas solidajn kaj utilajn konceptajn modelojn, kiuj, kvankam devenantaj el tre malsamaj historiaj kaj sociaj kuntekstoj, restas aplikeblaj al la analizo de nuntempaj juraj problemoj. Tiusence, la tomisma filozofio povas ne nur provizi rigorajn etikajn kriteriojn, kiuj respektas la gravecon de individuaj

liberecoj en la nuna socio, sed ankaŭ sugestis praktikajn kaj pozitivajn vojojn, kiel la socian kaj edukatan antaŭenigon de civitaj virtoj, anstataŭ sin turni ekskluzive al kriminala puno.

Referencoj.

- Akvino, T. de. (1989). Suma de Teología II. Parte I-II. [Sumo de Teologio II. Parto I–II] (A. Martínez, D. González, L. López de Las Heras, J.M. Rodríguez Arias, R. Larrañeta, V. Rodríguez, A. Sanchís, E. Pérez, A. Osuna, N. Blazquez, R. Hernández, colaboradores). Biblioteca de autores cristianos. (Originala verko verkita proksimume inter 1265 kaj 1274).
- Akvino, T. de. (1990). Suma de Teología III. Parte II-II (a) [Sumo de Teologio III. Parto II–II (a)]. (O. Calle Campo, L. Jiménez Patón, L. Lago Alba, M. Gelabert Ballester, A. Escalada Tijero, H. de Paz Castaño, E. García Estébanez, kunlaborantoj). Biblioteca de Autores Cristianos. (Originala verko verkita proksimume inter 1265 kaj 1274).
- Article 19. (2015). Discurso de odio. Manual. [Malamparolado. Manlibro] <https://www.article19.org/wp-content/uploads/2020/03/ARTICLE-19-Manual-sobre-el-Discurso-de-Odio.pdf>
- Corte Suprema de Justicia de la Nación Argentina. (2024). Libertad de Expresión. “Real Malicia” y “Campillay” [Esprimlibereco. “Reala Malico” kaj Campillay”]. <https://sj.csjn.gov.ar/homeSJ/suplementos/suplemento/68/documento>
- Global Freedom of Expression. Columbia University. (sen dato). Handyside v. Reino Unido. Análisis de caso [Handyside kontraŭ Unuiĝinta Reĝlando. Analizo de kazo]. <https://globalfreedomofexpression.columbia.edu/es/cases/handyside-v-uk/>
- Güerri Ferrández, C. (2015). La especialización de la fiscalía en materia de delitos de odio y discriminación. [La specialiĝo de la prokuroro pri deliktoj de malamo kaj diskriminacio] InDret, 1.2015. <https://indret.com/la-especializacion-de-la-fiscalia-en-materia-de-delitos-de-odio-y-discriminacion/>
- Grau-Álvarez, J. (2021). La libertad de expresión y discurso del odio: Estudio comparado de la jurisprudencia de Estados Unidos y Europa. [Esprimlibereco kaj malamparolado: kompara studo pri la jurisprudenco de Usono kaj Eŭropo]. ICADE. Revista De La Facultad De Derecho, (111), 1–33. <https://doi.org/10.14422/icade.i111.y2021.003>
- Instituto Nacional contra la Discriminación, la Xenofobia y el Racismo. [Nacia Instituto kontraŭ Diskriminacio, Ksenofobio kaj Rasismo] (2011). Somos iguales y diferentes. Guía para niñas y niños de prevención de prácticas discriminatorias. [Ni estas egalaj kaj malsamaj. Gvidlibro por knabinoj kaj knaboj pri prevento de diskriminaciaj praktikoj]. Memeldono. https://www.argentina.gob.ar/sites/default/files/guia_didactica_para_docentes.pdf

- Richter, A. (2022). El discurso del odio ¿una acción penalmente relevante? [Malamparolado. Ĉu ago kriminale grava?] Revista Pensamiento Penal, No. 438. <https://ri.conicet.gov.ar/handle/11336/206727>
- Toscano, M. (2022). Pornografía, odio y libertad de expresión. Los argumentos de Ronald Dworkin. [Pornografio, malamo kaj esprimlibereco. La argumentoj de Ronald Dworkin] Isegoría, (67), e04. <https://doi.org/10.3989/isegoria.2022.67.04>

SCIIGO AL MEMBRARO DE INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO

Unu el la traktendaj punktoj dum la venonta asembleo de la asocio, okazonta kadre de la proksima Universala Kongreso en Graz (Aŭstrio), estas la elekto de nova estraro por la periodo 2026-2029. Post 3 jaroj da ofico, laŭ-statute, oni devas kunvoki balotadon por elekti novan estraron. Ĉiuj ordinaraj membroj (OM) de la asocio rajtas prezenti sian kandidatecon por esti elektata al unu el jenaj oficoj:


• Prezidanto • Sekretario • Kasisto • 2 sen-oficaj estraranoj.

Do, oni informas al ĉiuj interesitoj, ke ili rajtas prezenti sian kandidatecon, pere de sendo de tiurilata komuniko al la ret-adreso jurista@esperanto.ac La limo por la prezento de tiu preteco estas la okazigo mem de la asembleo, do komence de la monato aŭgusto.

Komprenoble, ĉiuj interesitoj rajtas prezenti sian kandidatecon dum la asembleo mem, tamen cele al la plej bona aranĝado de la balotado, pli konvenas antaŭinformi pri la kandidatiĝo. Dankon!

La Prezidanto

INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO
www.esperantojuro.org
jurista@esperanto.ac



Jura Fakultato de la Universitato de Graz (Aŭstrio)



La koncepto pri "seka marbordo" en la Internacia Juro

José María Rodríguez (Hispanio)


La Internacia Mar-Juro, sistemigita ĉefe en la Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri Mar-Juro (UNKMJ) de 1982, eliras de fundamenta fizika kaj jura premiso: *la tero dominas la maron*. Laŭ ĉi tiu kerna principo, la Ŝtato posedanta suverenecon super marborda strio, akiras aŭtomate kaj kiel akcesoraĵon de sia teritorio, rajtojn pri suvereneco kaj jurisdikcio super la apudaj maraj spacoj, tiuj estas la teritoria maro, la najbara zono, la ekskluziva ekonomia zono kaj la kontinenta breto.

Tamen, la historia evoluo, la influado de la koloniaj potencoj, la kapricaj geografiaj formoj kaj la traktatoj aperigis esceptan juran anomalion, konata de la doktrino kiel “*seka marbordo*”.

La seka marbordo prezentiĝas kiam la landlimo inter du Ŝtatoj estas formale fiksita ĉe la linio de la bordo mem de la maro, rivero aŭ lago. Tiamaniere ke unu el la marbordaj Ŝtatoj posedas suverenecon ĝis la ekzakta limigo kie la akvo tuŝas, tamen ĝi ne ĝuas suverenecon aŭ jurisdikcion super la akvoj de la apuda maro. Ĉi-kaze, la teritoria maro komenciĝas tuj kaj seninterrompe sub la jurisdikcio de la najbara Ŝtato.

Ĉi tiu fenomeno detruas la naturan duopon “tero-apuda maro” kaj aperigas likvan landlimon, kie unu el la Ŝtatoj regas la teron ĝis la mar-bordo, dum la alia ĝuas suverenecon kaj jurisdikcion super la maroj ekde la unua metro de la marbordo. Tra la historio, ĉi tiu malsimetrio kaŭzis profundajn geopolitikajn streĉiĝojn, ekonomiajn blokadojn, armitajn incidentojn kaj malfacilajn procesojn antaŭ la Internacia Kortumo kaj arbitraciaj tribunaloj, transformante geografian koncepton en grandegan defion por la paca kunekzistado kaj la praktika aplikigo de la Internacia Juro.

La ekzisto de seka marbordo ne ŝuldiĝas al logika evoluo de la Marjuro, sed al pasintaj politikaj realaĵoj, ofte truditaj pro koloniaj potencoj aŭ pro la neceso solvi terajn landlimajn konfliktojn, sen antaŭvidi la estontajn implicojn de la mara projekcio. Tiel, dum la 19-a kaj 20-a jarcentoj, la firmigo de landlimoj en Latin-Ameriko, Afriko kaj Azio sekvis la principon pri konservado de limoj de la antikvaj koloniaj administraj dividoj. Ofte, la koloniaj potencoj aŭ la novaj respublikoj desegnis landlimojn uzante la bordon de rivero, estuaro aŭ mara marbordo kiel absolutan kaj nediskuteblan dividlinion, por eviti la kunposedon de la akvoj aŭ por certigi la strategian kontrolon de navigeblaj vojoj favore al unu el la partioj.



Kiam ekzistas landlimo difinita de "seka marbordo" la tuta akva zono, ĉu mara, rivera aŭ laga, troviĝas sub la jurisdikcio de unu el la Ŝtatoj.

Male, en la nuntempa Internacia Juro, la teritoria maro estas komprenata kiel etendiĝo de la ŝtata teritorio. Tiel, la artikolo 2-a de la UNKMJ disponas, ke la suvereneco de marborda Ŝtato etendiĝas preter ĝia teritorio kaj internaj akvoj al apuda mar-strio. Malgraŭ tio, kiam valida internacia traktato metis kiel kondiĉon, ke la landlimo pasas ĝuste laŭlonge de la marbordo, okazas eksplicita rezigno aŭ konvencia ekskludo de tiu projekcio. Ni ne forgesu, ke la artikolo 26-a de la Viena Konvencio pri la Juro de Traktatoj proklamas la principon «*pacta sunt servanda*», tio estas traktatoj devas esti plenumataj. Do, tiu principo devigas la Ŝtatojn respekti tion akordatan ene de traktato, eĉ se tio provokas la ne-aplikadon de ĝeneralaj reguloj, kiel tiuj de la UNKMJ.

Por kompreni ĉi tiun aferon kaj ĉefe la malfacilan situacion de tiu ŝtatoj kiuj ne povas etendi sian suverenecon preter sia marbordo, estas necese pristudi kelkajn konkretajn geografiajn scenarojn.

La seka marbordo de la insulo Martín García.

La insulo Martín García troviĝas ĉe la kunfluo de la riveroj Paranao kaj Urugvajo, ĝuste unu kilometron ene de urugvajaj akvoj. Tamen, laŭ la Traktato de la Rivero Plata, subskribita de Argentino kaj Urugvajo en 1973, oni konfirmis la argentinan jurisdikcion super la insulo, finiĝis tiam disputo de unu jarcento inter ambaŭ landoj. Pro rivera sedimentado, formiĝis nova insulo antaŭ la norda bordo de Martín García kiu estis nomita de Argentino *Punta Bauzá* kaj de Urugvajo *Timoteo Domínguez*. Ĉi tiu zono okazigis novan disputon inter ambaŭ ŝtatoj. La Traktato de la Rivero Plata agnoskis la urugvajan suverenecon sur ĉi tiu nova insulo, kiu preskaŭ unuiĝis al la teritorio de Martín García.



La insulo Martín García estas suverena teritorio de Argentino, kvankam ĝi estas tute ĉirkaŭigita de tero kaj mara zono sub urugvaja jurisdikcio. Do, la landlimo troviĝas ĝuste laŭlonge de la marbordo.

Kiel dirite, la insulo estas ĉirkaŭigita de mara zono de urugvaja suvereneco, tamen la insulo estas argentina teritorio. Laŭ la traktato subskribita de ambaŭ ŝtatoj, la insulo ne projektas sian suverenecon, ĉi-foje argentinan, preter la teritorio, pro la fakto, ke la akvo, rivera akvo, troviĝas sub urugvaja suvereneco. Do, jen ekzemplo de seka marbordo de insulo akordita de traktato inter du ŝtatoj.

Seka marbordo inter Malavio kaj Tanzanio

Ofte, la origino de seka marbordo troviĝas en la koloniigo de teritorioj, jen la kazo de la landlimo inter Malavio kaj Tanzanio en la lago Malavio. En la jaro 1890 Germanio kaj Britio subskribis la traktaton de Heligoland-Zanzibaro. Tiutempe Britio regis la kolonion Njasalandon, nuntempe Malavio,

kaj Germanio faris same rilate la kolonion Tanganikon, hodiaŭ Tanzanio. Laŭ tiu traktato ĉe la lago Malavio la landlimo inter ambaŭ kolonioj trakuris la tanganikan marbordon, do la tuta laga akvo apartenis al Njasalando. Okaze de la sendependiĝo de ambaŭ kolonioj, la novaj Ŝtatoj decidis ne disputi pri landlimoj kaj respekti tiujn ekzistantajn en la momento de la sendependiĝo. Do, nuntempe la landlimo inter ambaŭ Ŝtatoj ĉe la Lago Malavio troviĝas ĝuste laŭlonge de la Tanzania marbordo.



La landlimo inter Malavio kaj Tanzanio, se paroli pri la Lago Malavio, troviĝas ĝuste laŭlonge de la tanzania lag-bordo. Ĉi tio ne okazas inter Malavio kaj Mozambiko, kie la landlimo troviĝas meze de la lago.

Kiel kuriozaĵo, kaj laŭ oni povas vidi sur la apuda landkarto, por difini la landlimon inter Mozambiko kaj Malavio same en la lago Malavio, oni adoptis la mezan punkton de la akvoj de tiu lago, kontraŭe al la landlimo inter Malavio kaj Tanzanio, kiu troviĝas ĝuste laŭlonge de la tanzania marbordo.

Seka marbordo de la rivero San Juan inter Nikaragvo kaj Kostariko.

Ofte la konkretigo de landlimo laŭlonge de la marbordo de la fronta najbara ŝtato ŝuldiĝas al verdikto de la Internacia Kortumo. Tio okazis en la difino de la landlimo inter Nikaragvo kaj Kostariko ĉe la zono de la rivero San Juan.

La traktato Cañas-Jerez de la jaro 1858 atribuis la nordan bordon kaj la region super la akvoj de la rivero San Juan al Nikaragvo, kaj la sudan bordon, sen ia ajn jurisdikcio sur la rivero, al Kostariko. Ĉi lasta ŝtato ricevis porĉiamajn rajtojn de navigado por komercaj celoj en la rivero.

Arbitracia decido de la usona prezidanto Grover Cleveland en la jaro 1888 redifinis kelkajn konfuzajn limojn en la traktato de 1858 kaj fiksitis, ke kostarikaj ŝipoj povas navigadi tra la rivero, nur se temas pri komercaj ŝipoj, neniel tiu rajto etendiĝas al militŝipoj.

Post konflikto inter ambaŭ ŝtatoj, pro la devigo de pas-pago al kostarikaj turismaj boatoj navigantaj tra la rivero, la kostarika prezidanto Abel Pacheco prezentis la disputon pri la navigaj rajtoj al Kortumo de Hago, la ĉefa jura organo de Unuiĝintaj Nacioj. Inter la 2-a kaj la 12-a de marto 2009, reprezentantoj de Kostariko kaj Nikaragvo prezentis siajn argumentojn antaŭ la Tribunalulo.



En julio 2009, la Kortumo agnoskis la rajton de Kostariko libere navigadi por komercaj celoj sur la rivero San Juan laŭ la Traktato Cañas-Jerez, sed eksplicite oni limigas ke armitaj kostarikaj policistoj tion faru. La Kortumo ankaŭ deklaris, ke la suvereneco kaj regado super la rivero San Juan apartenas nur kaj ekskluzive al Nikaragvo, kiu povas reguligi la horarojn de navigado de la kostarikaj ŝipoj, inspekti ilin kaj ordoni la prezentadon de dokumentoj. Do, Kostariko nur havas sekan marbordon en la landlima rivero San Juan.


Tamen la aplikigo de seka marbordo fare de internaciaj tribunaloj aŭ de arbitraciistoj havas kiel bazon historiajn akordojn aŭ kutimojn. Tiel, el la internaci-jura vidpunkto oni pravas eviti absolutajn sekajn marbordojn en la novaj procesoj, preferante krei limojn super la akvoj de maro, rivero aŭ lago tra geometria mez-linio, por ebligi la ekziston de fenestro de mara projekcio al ĉiuj marbordaj ŝtatoj.

Kompreneble ne ĉiuj kazoj, kie aperas la koncepto pri seka marbordo estis jam solvitaj, ĉu pere de ambaŭpartiaj akordoj ĉu per verdikto de la Internacia Kortumo. Do, estas eble trovi lokojn, kie ŝtatoj diskutas pri suverenecaj rajtoj sur teritorio kaj apudaj maroj. Jen kelkaj el ili:

La mara landlimo inter la Respubliko Irlando kaj Nord-Irlando.

La tera landlimo inter la Respubliko Irlando kaj la brita teritorio de Nord-Irlando estis akordita en la 1920-aj jaroj, kiel rezulto de la Brit-Irlanda Traktato de 1921. Nordokcidente la landlimo etendiĝas de la estuaro de la rivero Foyle ĝis la glacia fjordo Carlingford oriente en la Irlanda Maro. Tamen, la mara landlimo restas nedefinita en ambaŭ estuaroj, ĉefe post la efektiviĝo de la Briteliro kaj la eliro de Unuiĝinta Reĝlando el la Komuna Fiŝkaptita Politiko, kiu agnoskis al ambaŭ najbaraj Ŝtatoj la historiajn rajtojn fiŝkapti libere en tiuj akvoj.

Siaflanke, laŭ la irlanda pozicio, tiuj akvoj verdire troviĝus sub irlanda suvereneco, do la sekaj marbordoj estus tiuj de la britaj graf-landoj. Laŭ la dublinaj aŭtoritatuloj, Britio konservis nur la teritorion de tiuj ses graf-landoj, kiuj estis nur regionoj, ne ŝtatoj, kiam ili decidis resti sub brita regado, do al ili mankus proprajn marajn teritoriojn .



Ĉe ambaŭ ekstremoj de la landlimo inter la Respubliko Irlando kaj Nord-Irlando (Britio) ĉiu partio defendas, ke la alia havas "sekan marbordon" laŭlonge de la landlimo.

La mara landlimo inter Hispanio kaj la brita kolonio Ĝibraltaro.


La kazo de Ĝibraltaro estas unu el la plej antikvaj kaj samtempe aktualaj ekzemploj de la problemaro pri “seka marbordo” en la Internacia Juro, devenanta de miskomprenoj en akordo subskribita en la 18-a jarcento, tio estas la Traktato de Utreĥto de 1713.


Laŭ la artikolo 10-a de tiu traktato, la hispana krono cedas al brita krono *“la plenan kaj tutan proprieton de la urbo kaj la kastelo de Ĝibraltaro, kune kun ĝia haveno, defendoj kaj fortikaĵoj”*. Videblas, ke en la listo de teritorioj kaj zonoj ceditaj, se paroli pri akva zono, oni mencias nur la havenon.

Pro ĉi tiu historia preterlaso, Hispanio subtenas firman juran pozicion, se oni cedis nur la teran teritorion kaj la internajn akvojn de la haveno, la maro kiu ĉirkaŭas la kolonion, kaj oriente kaj okcidente, restas sub hispana suvereneco, laŭ la laŭlitera kompreno de la artikolo subskribita. Do, Hispanio defendas, ke estas aplikebla rilate la britan kolonion de Ĝibraltaro la figuron de seka marbordo, escepte rilate la akvojn de la ĝibraltara haveno.

Kontraŭe, Britio asertas, ke la ne-mencio sur la traktato de la mara zono ĉirkaŭ la kolonio estas ne-rimarkinda, pro la fakto ke kiu ajn teritoria cedo provokas aŭtomate la cedon de la ĉirkaŭantaj maraj zonoj. Krome, Britio defendas la modernan principon de la Mar-juro “la tero dominas la maron”, tio provokus ke teritoria suvereneco generas aŭtomate la rajton projekcii ĝis tri marmejlojn de teritoria maro ĉirkaŭ si. Do, la britaj aŭtoritatoj defendas, ke la landlimo inter la kolonio kaj Hispanio situigĝas laŭlonge de meza linio inter ambaŭ teritorioj.



 Mara landlimo de la kolonio Ĝibraltaro laŭ Hispanio.

 Teritoria maro sub ĝibraltara jurisdikcio, laŭ britaj aŭtoritatoj.

Ĉi tiu manko de konkretigo de mara landlimo provokas konfliktojn pri jurisdikcio kaj kontrolo, pro la fakto, ke en tiu maro la hispana polico persekutas kontrabandon aŭ drogkomecon tuj apud la kolonio, sekve al ĉiu eniro de la hispana polico, la koloniaj britaj aŭtoritatoj akuzas Hispanion pri “kontraŭlegaj trudeniroj” en britajn akvojn.

* * *

Resume, kadre de la nuntempa Internacia Juro, la koncepto pri “seka marbordo” ne ekzistas eksplicite, nek estas reguligita per tiu nomo en la Konvencio de la Unuiĝintaj Nacioj pri Mar-juro. Kiel dirite, la jura arkitekturo de ĉi tiu konvencio baziĝas sur la maksimumo “la tero dominas la maron”. La artikoloj 2, 3, 57 kaj 76 de la konvencio proklamas ke ĉiu marbordo generas aŭtomate marajn spacojn, tio estas: teritoria maro, apuda zono, ekskluziva zono kaj kontinenta breto. Tial, sub la ĝeneralaj reguloj de la UNKMJ estas jure neeble ke Ŝtato posedu marbordan linion sed ne maron.

Tamen, la Konvencio lasas “pardon malfermitan” en siaj artikoloj 15, 74 kaj 83 al ĉi tiu figuro, kiam oni proklamas, ke limoj devas esti faritaj per interkonsento inter la partioj kaj kun la celo atingi “justan solvon”. Same, se antaŭa historia traktato aŭ deviga jura atesto fiksas la landlimon ĝuste laŭlonge de la maro, tio estas respektata de la konvencio. Do, oni akceptas la ekzistadon de escepta "seka marbordo". Sed estas necese agnoski, ke la internaci-jura jurisprudenco konsideras la sekan marbordon kiel geografian anomalion. Tiel, kiam tribunalo aŭ arbitraciistoj devas desegni limojn, ofte oni modifas la geometriajn liniojn por havigi al la Ŝtato en malavantaĝo, almenaŭ minimuman projekcion en la maron, garantiant, samtempe, ke la UNKMJ plenumu sian ĉefan celon, tio estas eviti konflikt-zonojn en la maro kaj certigi la justecon en la oceanoj.





Justic-palaco de Graz inaŭgurita en la jaro 1894. Hodiaŭ urbodomo.



La urbo Graz en la komenco de la 20-a jarcento



Arta Muzeo de Graz, inaŭgurita en la jaro 2003.



AFRIKO

KONSTITUCIO NE POVAS ESTI UZATA KIEL ŜILDO KONTRAŬ FUNDAMENTAJ HOMAJ RAJTOJ



La Afrika Kortumo pri Homaj kaj Popolaj Rajtoj, kun sidejo en Aruŝo (Tanzanio) proklamis verdikton en la kazo *Ado Shaibu kaj aliaj v. Unuiĝinta Respubliko Tanzanio*, kiu reprezentas gravan mejloŝtonon en la rilato inter nacia suvereneco kaj internacia juro en la afrika kontinento.

La kazo pritraktis la artikolon 41-an de la Konstitucio de Tanzanio, kiu starigas absolutan imunecon rilate la rezultojn de la prezidenta balotado. Tiel,



post kiam la Balota Komisiono deklaris gajninton, neniu kortumo en la lando havis la juran povon pridemandi aŭ revizii tiun rezulton. Laŭ la plendantoj, tio povus kaŝi iun ajn eblan fraŭdon aŭ neregulaĵon, ĉar neniu civitano povus esti aŭskultata se oni prezentas seriozajn dubojn pri la rezultoj. Do, oni damaĝas la rajton havi justan juĝon.

La Afrika Kortumo unuanime proklamis, ke tiu artikolo perfortas la artikolojn 1-an kaj 7-an de la Afrika Ĉarto pri Homaj kaj Popolaj Rajtoj. Laŭ la Kortumo, la internaj leĝoj de Ŝtato, eĉ se temas pri la Konstitucio mem, ne povas esti uzataj kiel ŝildo por plenumi perfortojn kontraŭ la fundamentaj homaj rajtoj. Do, la Afrika Kortumo postulas la tujan ŝanĝon de la Tanzania Konstitucio, kun tempo-limo de unu jaro, por akordigi ĝin kun la internaciaj normoj de la Afrika Ĉarto. Certe, la fakto ke internacia tribunalo ordonu al suverena ŝtato reskribi ĉapitron de ties Konstitucio ne estas tre ordinara. Alie, la verdikto sendas mesaĝon al ĉiuj membro-ŝtatoj de la Afrika Unio: neniu balota venko, nek nacia leĝo staras super la rajto je efika jura protekto kaj super la ekzameno de sendependa juĝ-sistemo.

SINGAPURO ENKONDUKAS VIPO-BATOJN KIEL PUNON KONTRAŬ KIBERNETIKAJ KRIMOJ



Reage al kresko de kibernetikaj fraŭdoj, kiuj jam estas la 60% el la raportitaj krimoj en Singapuro, la Parlamento de ĉi tiu malgranda ŝtato aprobis novan leĝon kiu aplikos severajn, eĉ korpajn, punojn kontraŭ ĉi tiaj krimoj. La nova leĝo ekvalidiĝis la pasintan 30-an de decembro kaj starigas du nivelojn de fizikaj punoj, aplikeblaj al viroj inter 18 kaj 50 jar-aĝaj.

La ĉefaj membroj de krimaj sindikatoj kaj la rekrutantoj de fraŭdaj retoj ricevos punon de inter 6 kaj 24 vipo-batoj, ĉefe batoj per kano el bambuo, kiuj aldoniĝos al la ekonomiaj monpunoj kaj al la jam ekzistantaj malliberigaj punoj de ĝis 10 jaroj da enkarcerigo.

Por tiuj homoj, kiuj agas kiel perantoj, tio estas, ili metas je la dispono de krimaj organizoj siajn banko-kontojn, SIM-kartojn aŭ ŝtatajn ciferecajn identigilojn por mono-lavado, povos ricevi ĝis 12 vipo-batojn. La nova leĝo nuligas la eblecon preteksti ne-scion, punante severe la neglekton pri la gardado de personaj datenoj.

La internacia komunumo de juristoj atente analizas ĉi tiujn rimedojn. Historie, Singapuro rezervis fizikajn punojn al sango-krimoj, perfortoj aŭ drogo-trafikado. Similigante la kibernetikan fraŭdon al tiuj gravaj krimoj, Singapuro sendas al transnaciaj mafiaj grupoj mesaĝon de nula toleremo kontraŭ krimoj kiuj endanĝerigas sian internacian financon reputacion.



ŜTATO FRONTE AL OCEANO: LA JURA REVOLUCIO DE TUVALO



Tuvalo estas malgranda insularo kun tre basa altitudo, 2 metrojn averaĝe, pro tio, ĉi tiu Ŝtato estas minacata de la kresko de la mar-nivelo, eĉ sciencistoj asertas ke la plej granda parto de la teritorio restos sub-akve je la fino de la kuranta jarcento. Do, la tuvalaj aŭtoritatoj ne nur serĉas rifuĝejon por la enloĝantaro, ili ankaŭ volas redifini la koncepton pri suvereneco en la Internacia Juro.

Historie, Ŝtato malaperis, se ĝi komplete perdis sian teritorion. Tamen, reformo en la Konstitucio de Tuvalo volas certigi la ekziston de suverena ŝtato kune kun ĝiaj maraj zonoj porĉiame, tio estas, eĉ se ĝi ne posedas jam fizikan teritorion. Ĉi tiu nova koncepto pri suvereneco volas krei la figuron de “*Sentera Ŝtato*” aŭ “*ŝtato cifereca*”, kun samaj rajtoj kaj devoj ol aliaj ŝtatoj membroj de Unuiĝintaj Nacioj.



Pro tio Aŭstralio kaj Tuvalo ĵus subskribis la traktaton de Falepili, laŭ kiu, la enloĝantaro de Tuvalo povos loĝi en Aŭstralio, se ili estas devigitaj forlasi sian teritorion. Tamen, pere de ĉi tiu traktato la malgranda insulara ŝtato perdas sian aŭtonomecon rilate internaciajn aliancojn, pro la fakto, ke Aŭstralio rajtas vetoi kiun ajn akordon pri defendo aŭ sekureco inter Tuvalo kaj aliaj ŝtatoj, sendube temas pri strategia movo por eviti la ĉinan influon en la regiono.

Kritikoj al akordo kun Aŭstralio opinias, ke ĝi erozias la suverenecon de la malgranda insularo, tamen, defendantoj asertas, ke temas pri komprenado de la klimat-ŝanĝo, ĉar la ekzisto de la ŝtato mem estas minacita. Laŭdire, Tuvalo montris ke la Internacia Juro devas evolui kun la celo protekti la identecon kaj la rajton de popolo, eĉ kiam tiu popolo perdis sian teritorion komplete.



La Supera Kanada Kortumo agnoskis novan specon de sendependa civila delikto, tio estas: civila delikto pro perforto de intima partnero, konsiderante la trudeman kontrolon de partnero kiel konduton rekte akuzebla antaŭ la justico. La kazo “*Ahluwalia*” alvenis en la Superan Kortumon post longa proceso kiu komenciĝis en Ontario. Tie, virino plendis

kontraŭ sia eksedzo ne nur por peti divorcon kaj dividon de havaĵoj, sed ankaŭ por postuli ekonomian kompenson pro fizikaj, emociaj kaj financaj damaĝoj okazigitaj dum jaroj da geedzo.

Multfoje, viktimoj de genra perforto en familiaj etosoj enkadrigis siajn postulojn ene de ĝeneralaj juraj figuroj, kiel “*atako*”, “*perforto*”, “*kaŭzado de emocia angoro*”. Tamen, tiuj figuroj aperis nesufiĉaj por juĝi tion, kion psikologoj nomas “trudemam kontrolon”, tio estas daŭra izoligo, humiligo kaj kontrolo de edzino. Ĉi tiu damaĝo ne ĉiam lasas videblajn fizikajn vundaĵojn, male ili detruas la aŭtonomecon kaj memkonsideron de homo laŭlonge de la tempo.

La verdikto de la Supera Kortumo, 6 voĉoj poraj kaj 3 kontraŭaj, determinis, ke la kanada jura sistemo bezonis specifan figuron por trakti ĉi tiun realecon, konsiderante ke la trudema kontrolo estas ekonomie punebla. Malsame al aliaj deliktoj kiuj postulas pruvojn konkretajn, ekzemple perforto en konkretaj momentoj, ĉi tiu nova figuro permesas al juĝisto konsideri damaĝojn akumulitajn pro konduktoj daŭrigitaj dum tempo. Fine, ĉi tiu verdikto malfermas pardonon por ke viktimoj ricevu mon-kompensojn rekte en familiaj tribunaloj, sen la neceso atendi ĝis kiam la kulpanto estu kondamnita en puna proceso, kie pruv-normoj estas multe pli striktaj.

EKVADORO AGNOSKAS LA RAJTON PRI GENRA IDENTECO AL ADOLESKANTOJ



La Konstitucia Kortumo de Ekvadoro konsideris paragrafon de nova leĝo pri identeco kaj genro kiel kontraŭ-konstitucian. Ĝi neprigis la kondiĉon esti almenaŭ 18-jaraĝa por postuli la ŝanĝon de la datumo pri sekso aŭ genro sur oficialaj dokumentoj. La jura rezolucio realigas postulon de diversaj GLAT-kolektivoj (gejaj, lesbaj, ambaŭseksemuloj kaj transgenuloj), kiuj argumentis, ke prokrastigi ĉi tiun rajton ĝis la plenaĝeco, sisteme vundas la liberan evoluon de la personeco kaj la rajton al propra identeco de transgenraj kaj genre malkonformaj junuloj. Tiel, devigante al adoleskantoj porti dokumentojn ne akordajn al ilia interna sperto, la Ŝtato diskriminacias ilin.

Krome, pro ĉi tiu diskriminacio, la Ŝtato metas al junuloj apartenantaj al GLAT-kolektivoj, en situaciojn de diskriminacio, lerneja ĉikanado kaj ekskludo el la eduka kaj sana sistemoj. La Kortumo fundamentis sian decidon sur la principio pri progresema aŭtonomeco, laŭ kiu, la kapablo de ne-plenaĝuloj efektiviĝi siajn rajtojn memstare pliiĝas dum ili maturiĝas kaj evoluas.



Tiusence, la tribunalo verdiktis, ke nei la kapablon decidi pri la propra identeco surbaze strikte de kronologia aĝo provokas neproporcian kaj diskriminacian limigon. Por garantii la juran sekurecon kaj la bonfarton de ne-plenaĝuloj, la Konstitucia Kortumo fiksas tri bazajn postulojn, kiujn oni devas plenumi por ekigi proceduron por ŝanĝi genron sur oficialaj dokumentoj, tiel, eksplicita kaj informita konsento de la adoleskanto mem; akompano de iliaj laŭleĝaj reprezentantoj kaj foresto de devigo, certigante, ke la decido baziĝas sur libera kaj matura proceso de memidentigo.



JURA Batalo inter Norvegio kaj Atestantoj de Jehovo



Ĉi tiu konflikto eksplodis, kiam la norvegaj aŭtoritatoj prenis senprecedencan decidon, nuligi la oficialan registradon kiel religian komunumon al la Atestantoj de Jehovo kaj suspendi ĉiujn ŝtatajn subvenciojn, kiuj ili povus ricevi. La argumento de la norvega ŝtato ne baziĝis sur teologiaj aferoj, sed nur sur homaj rajtoj. Tiel, la registaro denunciis la praktikon de “socia repudio” fare de la Atestantoj de Jehovo, temas pri interna regulo, kiu postulas ĉesigi kian ajn ligan aŭ kontakton kun tiuj membroj, kiuj estas eksigitaj aŭ decidas forlasi tiun fidon. Laŭ la norvegaj aŭtoritatoj, ĉi tiu praktiko vundas la rajtojn de la infanoj kaj efektivas psikologian trudadon malkongruan kun la leĝoj de la lando.

La jura batalo translokiĝis al tribunaloj. Tie, la religia organizaĵo defendis, ke la eksigo kaj posta izoligo estas kolonoj de ilia eklezia aŭtonomeco kaj asoci-libereco, aferoj protektataj de la Eŭropa Konvencio pri Homaj Rajtoj. Ili argumentis, ke la ŝtato ne rajtas disponi kiel religia asocio devas organizi sin interne, kaj ke la plenkreskaj membroj akceptas tiujn regulojn propravole.



Post intensa jura itinero, la tribunaloj fine juĝis ke, kvankam la praktiko de tiu “repudio” estas profunde polemika kaj dolora por tiuj, kiun ĝin suferas, ne ekzistas pruvoj pri sistema aŭ krima psikologia fitrakto, kiu pravigus tiel severan sankcion fare de la Ŝtato. Same, la tribunalo memorigis, ke en plurisma socio, la religia libereco implicas akcepti la ekziston de grupoj kun striktaj aŭ nepopularaj reguloj, kondiĉe ke ili ne malobeu rekte la leĝaron.

Ĉi tiuj kazo starigas decidan precedencon. Unuflanke, oni proklamas, ke la aŭtonomeco de la religiaj asocioj plifortiĝas kontraŭ la ŝtata interveno. Aliflanke, ĝi lasas malfermita etikan dilemon, la malfacilecon de la modernaj ŝtatoj ekvilibrigi la protektadon de la individua bonfarto kun la respekto al la tradicioj de religiaj malplimulto.

Kiu rajtas esti membro de IJEA?



ORDINARA MEMBRO

estas profesia juristo aŭ posedas universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri Juro.

MEMBRO-STUDENTO

studas por atingi diplomon pri Juro.



MEMBRO-STAĜANTO

studas por atingi diplomon pri Juro.

MEMBRO-KORESPONDANTO

utile kunlaboradas kun la asocio, ĉu en esperanto, ĉu alilingve, jen laŭ invito de la asocio.



La jura diskuto inter Protagoro kaj Evatlo

Lukas Toczki

Evatlo, riĉega junulo, deziregis lerni la arton de elokventeco por prezenti sukcese pledojn en juĝaj procesoj. Cele al tio, li fariĝis lernanto de Protagoro, la plej lerta el la tiamaj sofistoj. Li promesis pagi al li grandan monsumon, certe tiun, kiun Protagoro petis, pagante la duonon antaŭ ol komenci la lernadon, kaj promesante pagi la restantan duonon en la unua tago, kiam li defendos aferon ĉe juĝejo kaj li gajnos.

Post multaj monatoj kiel lernanto kaj disĉiplo de Protagoro, kaj akirinte per studado kaj praktikado certan facilecon en oratorado, Evatlo ne akceptis juĝajn kazojn kiel defendanto. Ŝajnis, ke li ne deziris pagi la restantan parton de la promesita mono. Protagoro, kiu deziris ricevi la tutan mon-kvanton, faris decidon, kiu ŝajnis al li espero-plena: li petus la interkonsentitan rekompencan okaze de juĝa proceso kontraŭ Evatlo.

Kiam ili prezentis sin antaŭ la juĝistoj por defendi siajn respektivajn jurajn poziciojn, Protagoro unue diris:

—Lernu, stulta junulo, ke en ĉiuj ajn okazo vi devos pagi al mi tion, kion mi petas, ĉu la verdikto estos kontraŭ vi, ĉu ĝi estos favora al vi. Tiel, se la verdikto estos kontraŭ vi, vi ŝuldos al mi la rekompencan laŭ la verdikto, ĉar mi venkis en la proceso; sed se la verdikto estos favora al vi, vi ŝuldos la promesitan mon-kvanton al mi, ĉar tiel ni konsentis en nia kontrakto, tial ke vi estos gajninta.

Al tio Evatlo respondis:

—Ĉar mi bone konas vin, kiel sofistojn kaj amanton de la lingvaj paradoksoj, mi antaŭvidis vian pozicion. Pro tio, estos granda plezuro por mi ne nur kontraŭdiri viajn argumentojn,

sed ankaŭ, fine, venki vin dum ĉi tiu proceso.

Do, kara saĝa majstro, en ĉiu ajn okazo mi ne devos pagi al vi tion, kion vi petas, ĉu la fina verdikto estos kontraŭ mi, ĉu ĝi estos favora al mi. Ĉar se la juĝistoj juĝos favore al mi, mi nenion ŝuldos al vi, akorde al tiu ne-apelaciebla verdikto. Male, se ili prononcos verdikton kontraŭ mi, mi ree nenion ŝuldos al vi, ĉar tiel ni konsentis en nia kontrakto, tial ke mi ne estos gajninta.



Post la aŭskultado de ambaŭ argumentoj la juĝistoj opiniis, ke la afero estis dubinda kaj neklarigebla tiel, kiel ĝi estis prezentita. Por eviti ke ilia verdikto, kia ajn ĝi estus, povus esti nuligita, ili lasis la aferon nejuĝita kaj prokrastis la solvon ĝis tre malproksima tago. Tiel okazis, ke majstro pri elokventeco vidis sian propran argumenton konfuzita kaj turnita kontraŭ si mem de juna disĉiplo, kaj la subtileco de liaj kaptidirajoj fiaskis.





Pacta sunt servanda

La dilemo inter la promesita vorto kaj la ŝanĝiĝema realo

Ekde kiam ni havas rezon-kapablon, oni ripetas al ni preskaŭ sanktan principon de konduto en la socio, en la komerco kaj en la politiko: *«la promesita vorto devas esti plenumita»*. En la universo de la juro, ĉi tiu morala kaj civilizacia ordono estas resumita per unu el la plej famaj latinaj esprimoj: *pacta sunt servanda* (akordoj estas obeendaj).

Ĉi tiu principo estas la absoluta fundamento, sur kiu baziĝas la ĉiutagaj komercaj kontraktoj kaj la grandaj internaciaj traktatoj. Tiel, sen la certa espero, ke la partioj ligitaj en interkonsento adaptos sian estontan konduton al tio, kion ili subskribis, nia socia sistemo suferus kolapson.

Tamen, en nia dinamika mondo, suferanta pro ne-antaŭviditaj ekonomiaj krizoj, pandemioj, militoj kaj rapidaj teknologiaj progresoj, estas utile fari demandojn samtempe malkomfortan sed realisman: *Ĉu vere la paktoj devas esti plenumataj ĉiam kaj je kia ajna kosto?*

Pacta Sunt Servanda



Akordoj estas Obeendaj

Por kompreni la forton de ĉi tiu principo, ni unue devas kompreni, ke la devigeco de la interkonsentoj ne naskiĝis de la moderna burokratio, sed de profunda antropologia bezono. En la antikvaj kulturoj, ekzemple ĉe hititoj aŭ en la egipta imperio, rompi pakton ne estis simpla civila nepago. Male, ĝi estis 47

rekta defio al la dioj, kiuj agis kiel atestantoj de la ĵuro. Poste, la mezepoka kanonika ĵuro plifortigis ĉi tiun ideon, tiel, ne agi laŭ havigita vorto estis, tute simple, peko de mensogo.

Kun la alveno de la modernaj civilaj kodoj, inspiritaj de la Napoleona Kodo de 1804, ĉi tiu morala principo transformiĝis en laikan leĝon. Aperis tiam la dogmo, ke la kontrakto estas leĝo por la kontraktantoj. Se oni akceptis la kondiĉojn libere kaj sen trompoj, oni restas katenita al la promeso donita.

En la Internacia Ĵuro, kie ne ezistas “monda registaro” aŭ “tutmonda polico”, kiu devigas la landojn kondukti bone, la principo *pacta sunt servanda* estas proklamita en la artikolo 26-a de la Viena Konvencio pri Traktatoj de 1969. Ĉi tio estas tiel, pro la fakto, ke, se la ŝtatoj povus liberigi sin de siaj devoj kiam nova registaro estas elektata, la monda ordo retrovenus en la leĝon de la ĝangalo.

Pacta sunt servanda < > Rebus sic stantibus

Fronte al la principo *pacta sunt servanda* aperas alia, *rebus sic stantibus*. Laŭ ĉi tiu principo, oni permesas modifi aŭ nuligi kontrakton se la cirkonstancoj eksterordinare ŝanĝiĝas rilate al la momento de la subskribo. Ĝi aplikiĝas kiam neantaŭvidebla evento detruas la financon ekvilibron de la interkonsento, igante ĝian plenumon troa kaj maljusta afero por unu el la partioj.

Ni imagu malgrandan komerciston, kiu subskribis kontrakton por liberado de varoj dum tri jaroj. Post kelkaj monatoj, eksplodas senbrida inflacio je 500% aŭ okazas tutmonda sana krizo, kiu devigas fermi la entreprenojn per



registara dekreto. Ĉu estas juste, ke la justico devigu lin pagi troajn tarifojn por servo, kiun li eĉ ne povas uzi, puŝante lin al bankroto?

Ĉi tie agus la teorio de la ne-antaŭvidebleco. Tiam, juĝistoj povas interveni, ne por detruigi la kontrakton, sed por refari ĝin, rebalanci la devojn kaj savi la perditan egalecon inter la partioj.

Ĉe la internaciaj rilatoj, paktoj kaj traktatoj ankaŭ ne estas memmortigoj. Ŝtato povas provizore suspendi la plenumon de komercaj aŭ landlimaj devoj, se ĝi troviĝas antaŭ situacio de grava forto aŭ urĝa stato de neceso, ekzemple, klimata katastrofo aŭ rekta minaco al propra ekzisto de la ŝtato.

Krome, la principo *pacta sunt servanda* trovas netrapaseblan muron, tio estas la normoj de *ius cogens* (imperativa internacia juro). Neniu pakto estas valida se ĝia celo perfortas la fundamentajn homajn rajtojn. Ekzemple, internacia traktato kie estas akceptata la torturo, la homa trafikado aŭ kontraŭjura milita agreso kontraŭ tria lando estas nula ekde sia naskiĝo, sendepende de kiom da ŝtatoj subskribis ĝin.

Resume, ĉu vere akordoj estas obeendaj? La jura respondo estas jesa, tamen kun la okuloj malfermitaj al la realo. Tiel, la principo *pacta sunt servanda* devas resti kiel la ĝenerala regulo. Se oni permesas, ke la plenumo de la kontraktoj dependu de la nura volo, de la oportuneco de la momento aŭ de la politika oportunismo, oni detruos la reciprokan bonan fidon, kiu subtenas la ekonomion kaj la socian pacon. Tamen, la pakto ankaŭ estas subskribataj por servi al la homa kunvivado, do, kiam pakto detruas gravajn homajn aŭ sociajn valorojn, la traktato devas rezigni sin antaŭ la realo.



Galerio de elstaraj esperantistaj juristoj



Adolf Halbedl

Aŭstrio 1893 ~ 1983

Doktoriĝinta Advokato. Esperantisto de 1909.

Li Estis prezidanto de Aŭstria Katolika Ligo Esperantista (AKLE) kaj la Esperanto-Societo Peltier; iama estro de la Esperanto-Grupo en Graz.

Kunlaboranto de la revuoj «Espero Katolika», «Aŭstria Esperantisto», «Esperanto» kaj «Heroldo de Esperanto».



Kino kaj



Juro

Anatomio de falo

La filmo disvolviĝas en izolita alpa valo, tie loĝas Sandra, Samuel kaj ilia filo Daniel. Kiam Daniel revenas hejmen post promeno, akompanita de sia gvidhundo, li trovas la senvivan korpon de sia patro sur la neĝo kun granda vundo sur la kapo. Pro tio, ke ne estis atestantoj kaj la nekropsio donas nekonkludan rezulton, la enketo rapide oscilas inter memmortigo kaj murdo. La prokuroro decidas akuzi al Sandra.

Tiu-momente, la filmo translokiĝas al la tribunalo, por prezenti detale la juĝ-proceson. Dum ĝi, oni ne parolas pri krim-medicinaj aspektoj de la vundoj, male la proceso prezentas kruda, publika kaj perforta analizo de la privateco, la frustrigoj kaj la indignoj de la geedza vivo de la paro.

Malsimile al la hollywoodaj filmoj pri juraj procesoj, kiuj kutime estas plenaj de lastminutaj melodramaj turnoj kaj teatraj konfesoj sur la atesto-stando,



Anatomie d'une Chute. (2023) Produktita de Les Films Pelleás kaj Les Films de Pierre. Reĝisorita de Justine Triet. Ĉefaj aktoroj: Sandra Hüller, Swann Arlaud, Milo Machado-Graner, Antoine Reinartz, Samuel Theis, Jenny Beth, Saadia Bentaieb, Camille Rutherford, Anne Rotger kaj Sophie Fillières.

la filmo “Anatomio de falo” prezentas al spektanto ege realisman, malvarman kaj eĉ burokratan portreton de la franca justic-sistemo.

La plej profunda jura aspekto de la filmo estas la maniero kiel la proceso mem estas prezentanta, ne kiel sciancan serĉadon de “*tio, kio vere okazis*”, sed kiel batalon inter du fikciaj rakontoj. La prokuroro kaj la defend-advokato havas la samajn pruvojn, tamen ili konstruas du tute kontraŭajn romanojn surbaze de tiuj tute similaj pruvoj. La filmo montras al ni, ke ĉe tribunaloj, la verdikto ofte ne dependas de la realaj okazintaĵoj, sed de la maniero prezenti la rakonton antaŭ la ĵurio.



La prokuroro en la jura proceso, rolita de la aktoro Antoine Reinartz.

Dum la proceso aperas la plej doloraj diskutoj de la paro, la profesiaj fiaskoj kaj la kompleksaj psikologiaj aspektoj de la familio, ĉi ĉiuj elementoj estas prezentitaj antaŭ nekonatoj en malvarma maniero. La prokuroro, rolita majstre de Antoine Reinartz, estas inkvizicia kaj vundema profesiulo, kiu uzas la fikcian literaturon de la akuzitino, kvazaŭ ili estus realaj konfesoj. Krome, li estas prezentata kiel sendependa, sukcesa kaj ambaŭseksema virino, kiu ne kongruas kun la tradicia rolo de suferanta vidvino.

Pro tio, ke la proceso disvolviĝas en kontinenta (franca) jura sistemo, la prezidanta juĝisto gvidas la debaton kaj la rektan konfrontiĝon de prokuroro kaj defendanto en la salono. Krome, oni devas elstari la lingvo-barilon kiel juran obstaklon, tiel Sandra, germana, estas devigita defendi sin en lingvo (franca), kiun ŝi ne bone regas, sendube ofte la justeco dependas, tragedie, de la limoj de la lingvo.

La fino de la filmo estas brila kaj plur-senca ĉar la filmo rifuzas doni al la spektanto simplisman respondon de "kulpa aŭ senkulpa". Anstataŭe, ĝi metas la tutan pezon de la solvo sur la ŝultrojn de la filo, Daniel.



Sandra Voyter (rolita de Sandra Hüller)
kaj Samuel Maleski (rolita de Samuel Theis)



Daniel, la 11-jaraĝa filo de la paro, rolita
de Milo Machado-Graner.

La prokuroro prezentas decido-povan pruvon, temas pri sekreta son-registraĵo de perforto kverelo inter la geedzoj, tiam estis eble aŭskulti fizikajn batojn. Sandra insistas, ke Samuel memvundiĝis kaj ke la batoj estis kontraŭ la muro. La tribunalo decidas, ke Daniel, nur 11-jaraĝa, devas denove atesti. Li petas resti sola dum semajnfino por pripensi, nur akompanita de sia jura helpantino, Marge. En decida konversacio, Daniel konfesas al Marge, ke li ne scias kon kredi, al kio la helpantino respondas per unu el la frazoj, kiuj difinas la filmon: kiam mankas al vi informoj por scii kio vere okazis, la sola afero, kiun oni povas fari, estas decidi kiun rakonton vi kredos.

Lunde, jam antaŭ la tribunalo, Daniel rakontas memoron, kiun li antaŭe forgesis. Antaŭ monatoj, lia gvidhundo -Daniel estas blinda- grave veneniĝis tuj post manĝi restaĵojn de la vomaĵojn de la patro, kiu verŝajne provis memmortigi sin per piloloj. Daniel rakontas ke, dum li veturigis la hundon al la bestokuracisto, lia patro parolis al li per korŝira adiaŭa tono, dirante, ke li devas esti preta ĉar “la vivantaj estaĵoj, kiujn ni amas, povas malaperi de unu momento al alia”. Daniel asertis antaŭ la tribunalo, ke li nun komprenas, ke lia patro ne parolis pri la hundo, sed pri si mem.

Resume, "Anatomio de falo" estas majstra verko de ambigueco. Pli ol solvi misteron, ĝi malvarme dissekcas la fendojn de geedzeco kaj la neeblecon de la absoluta vero. La supera aktorado de Sandra Hüller subtenas brilan juĝan dramon, kiu malkomfortigas la spektanton, devigante lin juĝi sen certecoj.

ALIĜU AL INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO

Kiu rajtas esti membro de I.J.E.A.?

- Ordinara membro: devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri Juro.
- Membro-studento: devas studi por licenciigo pri Juro.
- Membro-staĝanto: devas staĝi en jura profesio.
- Membro-korespondanto: devas utile kunlaboradi kun la Asocio, ĉu esperanto, ĉu alilingve, jen spontane, jen laŭ invito de la Asocio.

Kiel aliĝilo plenumu la sekvantan paĝon kaj sendu ĝin al
jurista@esperanto.ac

Kotizoj.

La jara kotizo kostas 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latin-Ameriko. Se vi loĝas en alia lando la kotizo estas 14 eŭrojn.

Membro-studentoj aŭ membrostaĝantoj pagas neniom.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r. Ankaŭ oni povas aboni la jaran kotizon rekte okaze de la Ĝenerala Asembleo kiu ĉiu-jare okazas kadre de la Universala Kongreso de Esperanto.

Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al nia adreso: *jurista@esperanto.ac*





Internacia Jurista Esperanto-Asocio I.J.E.A.

ANIĜILO / MEMBRILO

Foto

Antaŭnomo:

Familia nomo:

Profesio:

Poŝtadreso:

Retadreso:

@

Urbo:

Lando:

Nacieco:

Kategorio de estonta asociano: ordinara asociano jurstudento
staĝanto korespondanto

Mi, pere de ĉi tiu peto, kandidatiĝas al la statuso de membro de IJEA obeonte ties statuton kaj pagonte la ĉi-suban kotizon.

Jarkotizo (se ordinara membro de ne-esceptaj landoj) 14 eŭroj
(se ordinara membro de iamaj socialismaj
orient-eŭropaj landoj, Azio -escepte Koreio,
Japanio kaj Israelo), Afriko kaj Latinameriko..... 7 eŭroj

Pagmaniero: Eblas ĝiri al UEA-konto **ejax-r**

Subskribo de la kandidato

Decido pri la kandidateco
per subskribo de IJEA estrarano

**Internacia Jurista Esperanto-Asocio
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**